

NOVEMBRO 2009  
DUOBLA NUMERO

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2009:5-6

X Har du ett kryss på adressetiketten?  
Ĉu estas ikso sur via adresetikedo?  
Läs på sidan 20.  
Legu sur paĝo 20.

## På arbetsbrigad på Esperantogården En laborbrigado en Esperanto-Gastejo

Esperantogården i Lesjöfors är i stort behov av reparation och underhåll. Esperantogårdens föreståndare Lennart Svensson tar när som helst emot esperantister som vill komma och hjälpa till med skötseln av gården under några dagar.

Foto Sabina Åradsson




### Okazas en Esperantujo...

Maldekstre: Praktika kunlaboro inter svedaj kaj norvegaj esperantistoj montriĝas per tio ke Douglas Draper el Oslo estas estrarano de la estraro de Esperanto-Gastejo.

Dekstre supre: Post mondvojado dum pli ol jaro, Mireille Grosjean el Svislando vizitis Nynäshamn en Svedio dum semajno. Dum la restado ŝi faris prelegon en la Esperanto-Klubo de Stockholm pri siaj ok monatoj da restado en Japanio, per pluraj centoj da bildoj pri variaj temoj kiel trafiko, aŭtuno, manĝoj, necesejoj, ĝardenoj, kaj kun la komuna temo "Ĉiutaga Japanio".

Dekstre malsupre: La Esperanto-Klubo de Stockholm regule aranĝas kantvesperon, kiun kutime gvidas Gunilla Almér. Kiam ŝi vizitas kongreson, ŝi kantas en la internacia koruso.

Fotis Ulla Luin



## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet  
ISSN 0014-0694  
Novembro 2009 • 97-a jarkolekto  
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson  
Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:  
EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42  
Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se  
E-post: laespero@esperanto.se  
Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm  
Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm  
Tryck: Al-fab-eto, Skövde  
Prenumeration 2009: 200 kr.  
Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem  
savgiften.  
Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00  
E-post: sveda@esperanto.se  
Nätsida: www.esperanto.se  
Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider  
dagtid. Ring i förväg!  
Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet  
Medlemsavgift 2009:  
Direktansluten medlem 200 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar  
under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,  
Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.  
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.  
Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG  
Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona  
E-post: eldona@telia.com Telefon: 0705-850054.

## ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,  
Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se  
Telefon: 0590-309 09

### Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11  
961 76 Boden, tel. 0921-123 54  
e-post: laespero@esperanto.se

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november


Utgivningsplanen är preliminär. Den som har  
brådskande information som måste komma ut  
senast ett visst datum bör ta kontakt med redak-  
tören i god tid innan.

## X

Om det är ett kryss på din adressetikett betyder  
det att du inte betalt din avgift för 2009.  
Du behövs som medlem i Svenska  
Esperantoförbundet.

## NI PREZENTAS

## Martin Persson



### Kie vi naskiĝis?

Mi naskiĝis en Stimmerbo ekster  
Smedjebacken.

### Kie vi loĝas?

Mi loĝas en Orsa.

### Pri kio vi laboras?

Mi estas emerita ĵurnalista.

### Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

Krom Esperanto mi havas  
amplaksajn interesojn, aparte  
rilatantaj al la homa evoluo.

### Ĉu vi havas familion?

Jes mi havas edzinon. Ŝi loĝas en  
flegejo proksime de mia  
apartamento.

Ni havas filon, nun loĝantan en  
Solna.

*De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*  
Kiel junulo kiam mia je 9 jaroj pli aĝa  
frato Artur lernis Esperanton.

Mi membriĝis en Sveda Esperanto-  
Federacio dek kvin- jara kaj restas  
membro, nun 90-jara.

### Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?

En la tiama Esperanto-klubo de  
Smedjebacken mi apartenis al ĝia  
"propaganda komitato". En la daŭra  
vivado mi malmulte agis por  
Esperanto, kaŭze de mia profesia  
laboro.

### Kiu estas via preferata libro en Esperanto?

Siatempe mi ŝatis Al Torento kaj  
Homoj sur la Tero de Stellan  
Engholm.

### Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?

Antaŭ kvindek jaroj mi tute hazarde  
renkontis krudan arbarlaboriston,  
sole loĝantan en simpla kabano, kiu  
alparolis min en Esperanto. Li  
observis la verdan steleton sur mia  
jako!

Cetere mi nuntempe ne kapablis  
skribi maŝine pro reŭmatisme pli-  
malpli difektitaj fingraj artikoj.

Skribe intervjuis: Hans Häglund

Ny e-postadress till La Espero  
Nova retadreso al La Espero

laespero@esperanto.se

## REDAKCIE

## Novaj kaj literaturo

Tiu ĉi numero de La Espero estas  
duobla. Ĝi fakte estas eĉ trioble  
granda ol kutime.

La numero enhavas kaj novaĵojn  
pri Esperanto kaj literaturojn.

Mi partoprenas komisionon, kiu  
prizorgas eldonadon de Novelaro  
2000-2009. Eldona Societo Espe-  
ranto espereble baldaŭ povos  
prezenti ĝin. En tiu ĉi La Espero mi  
povas prezenti novelon, kiu ne  
trovos lokon en la novelaro.  
Laŭkvalite ĝi trovos lokon, sed ni  
principe aperigas nur unu novelon  
de ĉiu aŭtoro kaj tial ĝi aperos ne en  
la novelaro, sed en La Espero. Sekve

vi trovos alian novelon de Lena  
Karpunina en la novelaro mem.

Mono estas grava afero, ankaŭ por  
Sveda Esperanto-Federacio. Tial ni  
petas vin ne forgesi pagi vian  
kotizon por 2010. Kelkaj el niaj  
membrom ankorau ne pagis por  
2009, kaj tial ricevos leteron kune  
kun tiu ĉi numero.

SEF bezonas vian apogon!

Leif Nordenstorm  
Via redaktoro

## Fjorton lär sig esperanto i Helsingborg

*På Slottsvångsskolan i Helsingborg kan man läsa esperanto. Läraren Annika Ahlfors berättar.*

Jag började läsa esperanto på en kvällskurs i Helsingborg vårterminen 2007. Innan dess hade jag knappt hört talas om detta språk men jag blev rätt snabbt intresserad av språket och dess historia. Eftersom jag till vardags jobbar som lärare för elever i årskurs 7-9 tänkte jag att någon gång kanske jag kan använda språket i min undervisning. För en tid sedan satt jag på jobbet tillsammans med några kolleger och planerade terminens ämne inför elevens val. Elevens val på vår skola ska ha temat "världens talanger" och en tanke började då gro. Tänk om...

Efter lite funderingar pratade jag med vår rektor om min idé att jag skulle hålla i en esperantoklass och kalla den "världens språk". Han tyckte genast att det var en jättebra idé och sa att det var häftigt om vår skola kan erbjuda en kurs i detta språk. Jag började finslipa min tanke och skrev en kort presentation till eleverna. "Är du nyfiken på och vill lära dig ett nytt språk? Vill du ha vänner i hela världen? Vill du umgås över nationsgränser på lika villkor? - Då ska du lära dig Esperanto! Esperanto skapades för mer än

hundra år sedan. Esperanto är lätt att lära sig och det är roligt att lära sig ett nytt språk. Med esperanto kan du kommunicera på lika villkor med människor från andra länder. Esperanto är ett roligt språk, ett vackert språk och ett språk som är gjort för vår tidsålder med snabba kommunikationsvägar över hela världen."

De ca 200 eleverna i skolår 7-9 fick tio ämnen att välja mellan på elevens val. Det var t.ex. idrott, drama, musik, bild och göra en tidning. Inom språkgenren kunde eleverna välja att läsa lite svårare engelska eller esperanto. Jag tänkte att språk inte lockar elever i denna ålder och trodde att kanske två eller tre elever skulle välja esperanto. Men när vi sedan gick igenom valblanketterna visade det sig att 16 elever hade valt esperanto i första handsval. Efter lite justeringar i alla grupper blev det till slut 14 elever i min grupp. Den 16 september började jag undervisa i esperanto för fem stycken killar i årskurs 7 och nio tjejer i årskurs 9. Varför inga elever i årskurs 8 har valt ämnet vet jag inte.

På vår första lektion började jag med att berätta om hur språket kom till, om Zamenhof och språkets utveckling fram till idag. Vi gick igenom alfabetet och då använde jag en kurs på [www.lernu.net](http://www.lernu.net) som heter Babili Esperante. På vår skola har vi så kallade smart boards i vissa klassrum. På dessa skärmar kan man visa sidor från internet via en filmprojektor. Detta blir som en stor datorskärm och alla elever kan se vad jag gör på datorn. Jag visade eleverna lite om vad som finns på [Lernu.net](http://Lernu.net) och förklarade att vi kommer att jobba en del med den sidan. Därefter fick eleverna lära sig att säga vad de heter och var de bor på esperanto. En elev utbrast

"det är precis som på spanska" om ett ord som vi gick igenom.


Inför lektion två kände jag att jag behövde ett material till eleverna. Jag tänkte att de behöver ett material som de kan jobba med själva samt med information om språket på en grundläggande nivå. Vår kurs är på ca 10 veckor á 70 minuter och de material som finns (t.ex. gymnasieboken Epogo) är för omfattande för oss. Jag fick helt enkelt tillverka egna häften till eleverna. Jag utgick då ifrån de inledande och grundläggande kurserna på [Lernu.net](http://Lernu.net). Elevernas häften innehåller nu: alfabetet, korrelativa tabellen, affix, nyttiga fraser och ord, räkneord, bildordlista, Ana Pana, del 1-5 samt länkar och tips. De kommer också att få ut kursen "Vojaĝu kun Zam" så småningom.

Under lektion två började eleverna med att stå vid sina bänkar sedan hälsade jag alla välkomna med orden: Bonan tagon. Eleverna svarade med samma fras och satte sig ner. Sedan repeterade vi det som vi gick igenom förra veckan. Därefter visade jag kursen "La puzlo Esperanto" från [Lernu.net](http://Lernu.net). Jag försökte förklara för eleverna hur språket är uppbyggt och efter en stund förstod de hur de skulle bilda ord med några vanliga affix. De började också arbeta med första delen av kursen "Ana Pana" och de fick några uppgifter i läxa.

Redan nu sprider sig esperanto i skolans korridorer. Några dagar efter första lektionen hör jag i trapphuset två tjejer som pratar med varandra, det är en av mina esperantoelever och en annan elev. Den ena tjejen säger till den andra "Mia nomo estas; det betyder jag heter". Jag log och konstaterade att språket nu börjar sprida sig utanför lektionssalen.

Annika Ahlfors

*Esperanto-  
elever på  
Slottsvångs-  
skolan i*



## Esperantisto en la 1930aj jaroj

Mia kapablo revivigi travivaĵojn dum mia junaĝo estas hodiaŭ reduktita sed antaŭ nelonge relegante libron de Werner Aspenström mi subite ek-memoris preskaŭ freŝe almenaŭ iom pri esperanto. Jen mi rakontos kiel eble koncize:




Stellan Engholm

L. Sinha el Hindio gastis ĉe Stellan Engholm (instruisto en vilaĝo Nyberget) kaj ili ambaŭ partoprenis vaporŝipan ekskurson sur lago Norra Barken, aranĝitan de nia esperantoklubo. Kiel la plej juna mi ĉeestis la ŝipveturon, sed ne kuraĝis alparoli la fremdan samideanon.

Mi ankaŭ, kvankam malklare, memoras alian veturon per tiu sama ŝipeto (kies posedantoj favore sentis por esperanto). Tiun fojon ni klubanoj/esperantistoj veturis per-ŝipe tra Norra kaj Södra Barken al Fagersta. Duonvoje surŝipiĝis veterana esperantisto, kiel pensiulo loĝanta sole en Söderbärke. Lia

nomo: Sven Valerius, iama instruisto en popola altlernejo (*folkhögskola*). En Fagersta ni interrilatis vigle kun la esperantistoj tie. La maljuna Valerius asertis ke li travivis neforgesblan tagon, opinio valida por ni ĉiuj.



Lakshmiswar Sinha

Mi mem 1937-38 loĝis kaj laboris en Fagersta. La esperantoklubo tie funkciis aktive kaj akceptis gastojn el fremdaj landoj.

Sed nun returne al Smedjebacken! La konata hungara esperanta aŭtoro Julio Baghy turneis en Svedio ĉirkaŭ 1935 vizitante plurajn klubojn, i. a. tiun en Smedjebacken. Li venis per trajno kaj ĉe la stacio lin renkontis la plej juna membro de la klubo: M. P.

Mi memoras lian malhelan voĉon, lian afablan rideton kaj lian tro pezan valizon. Ĝin ni lokigis al mia biciklo. Piede ni daŭrigis kilometre longe al instruistino Anna Andersson, kie riĉa mangotablo kaj propra ĉambro lin atendis.

Dum la promenado tien ni laŭeble konversaciis en esperanto, li tre, tre parolema, mi tre, tre silentema... Vespere Baghy prelegis kaj deklamis proprajn poeziaĵojn por atente aŭskultantaj anoj de la klubo.

Kiel militservrifuzanto mi loĝis preskaŭ tutan jaron en Uppsala. Mi tie kelkfoje renkontis Karl

Söderberg, tiam efika en la estraro de Svenska Esperantoinstitutet. Lin mi iom konis jam pro lia genta radiko en Smedjebacken. Cetere mi en Uppsala surface konatiĝis kun Ferenc Szilágyi kaj lia edzino.

Kelkajn fojojn mi partoprenis kunvenojn de la esperantoklubo. Mi memoras ke mi tie renkontis junan flegistinon kaj ke mi akompanis ŝin suden al la ekstera limo de la granda mal-sanulejo. Promenante ni interbabilis iomete en esperanto kun la fina esperiga saluto: Ĝis revido!

Per oftaj alvokoj la ŝtato "punis" la rifuzantojn. Mi translokiĝis al Stockholm por kvar monatoj. Unu fojon dum mia restado tie okazis al mi tre interesa travivaĵo: renkontiĝo kun Carl Lindhagen en Ålsten. Kiel akompananto al Bror Edberg en Svenska Freds mi vizitis familion Lindhagen en ilia hejmo en Ålsten. Lindhagen deklaris ke li "en animo kaj koro" estas esperantisto.

Sur ilia balkono kun ĝia belega, vasta vidaĵo Carl Lindhagen rakontis (por ni):

- Ĉi tie mi staris antaŭ kelka tempo kune kun klera amerikano kaj monaĥo el malproksima oriento. La amerikano ekkomentis: En Ameriko ĉi tiun vidaĵon validus milionon da dolaroj. La religiulo diris mediteme: Dankon kara Dio...

Mi pensas pri esperanto-rilataj renkontiĝoj en miaj pli fruaj jaroj kaj mia cerbo asocias senpere al la vilaĝa ŝuriparisto en Ore. Li riparis ŝuojn ĉe sia malnova maŝino kun lernolibro en esperanto apud si sur la ŝuriparila benko.

Multaj tiaj aŭtodidaktaj simile al la ŝuriparisto en Ore troviĝis tiam en nia lando, homoj kiuj sentis "anime kaj kore" por esperanto kaj la interna ideo de tiu Lingvo Internacia.

Martin Persson



Esperantistoj en la tridekaj jaroj.

DVD kiu enhavas prelegon de Paul Gubbins Mendu DoVoDon kun fotaj memoroj de nia Renkontiĝo en Borlänge. La ĉefa ero estas la prelego de Paul Gubbins pri la Langvolanĉilo. La formato estas DVDplusRW. Do eblas aldoni au forpreni erojn.

Ĝi kostas 35 kr inkl afranko. Sendu la monon al mia konto de Handelsbanken. clearing 6531, konto 103 977 252 Menciuj DVD plus vian antaŭnomon kaj sendu retleteron kun via adreso. Mia retadreso: w.posthuma@esperanto.se


## Al Orsa

La reviviginta Esperanto-klubo en Dalekarlio en septembro faris sian aŭtunan ekskurson al Orsa, kie vivas la 90-jara membro Marin Persson. Dek tri el dudek membroj partoprenis la kunvenon.


Martin Persson naskiĝis proksime de Smedjebacken. Li kiel junulo renkontis Stellan Engholm kiu loĝis proksime en Nyberget. Lia 9jarpliaĝa frato Arthur instruis Esperanton en Eŭropo dum la 3a jardeko. Martin translokiĝis al Orsa en 1947 kaj ĝis nun loĝis tie.

Dum nia kunveno li rakontis pri memorajoj, plejparte Esperante kvankam li "ne uzis Esperanton buŝe dum la lastaj 20 jaroj". Li ankaŭ perkere recitis i.a. poemon de Dan Anderson.

**Bengtgunnar**



*Martin Persson, Orsa kaj Åke Rodhin, Rättvik.*



## Lingva tago en Prezidanto Västerås nova de EG

La Eŭropa Lingvo Tago en Västerås, la 29an de septembro.

Jam en Julio kune kun la Centro de Dulingveco (la edukado en la patrinlingvoj) ni interkonsentis pri kunlaboro. En Aŭgusto okazis la detala planado en la kulturcentro Växhus de Västerås. Tie troviĝas ne nur tiu Centro, sed multaj aliaj "postlernejtempaj" lernejoj kaj kursoj. Laŭ mi la plej ideala loko en Västerås. Oni pruntedonis al ni projekcian aparaton kaj ekranon. Estis mia granda deziro, ke tio povu okazi. Mi nur bezonis kunporti mian komputileton kaj du malgrandajn laŭtparolilojn, se temas pri la teknikaj aranĝoj.

En tiu halo VEK ricevis lokon kie jam trovi is pentra oĵ.

Sed la plej granda altirilo estis la filmoj de la dovodo Esperanto estas farita de E@i. Mi montris ilin per granda ekrano. La parolo estis en Esperanto kun teksto en la sveda.

Ili kiuj sidis iom longe for kafrinkante kaj ne kuraĝas alproksimiĝi aŭdis almenaŭ la esperantan parolon kaj vidis la filmojn. Mi eĉ havis aliron al interreto por montri i.a. kiel "Lernu.net" funkcias.

Multaj preterpasis rigardante, sed daŭrigis al aliaj lokoj en la granda iama gimnazio. Sed kun kelkaj scivolemuloj ni buŝe donis informojn kaj disdonis la necesajn informilojn i.a. "Upptäck Esperanto". De du ni eĉ notis ilian adreson por daŭra kontakto.

**Wim Posthuma**

La kooperativo "Esperantogården i Lesjöfors" reelektis la estraron dum la jarkunveno 3 oktobro. La estraro konsistas el Hans Häglund el Ludvika, Martin Strid el Borlänge, Lennart Svensson el Lesjöfors, Anders Rylander el Malmö, Douglas Draper el Oslo. La estraro mem decidis, kiu estos prezidanto, kaj elektis Hans Häglund por tiu tasko, dum la ĝisnuna prezidanto Martin Strid dediĉos sin al evoluo kaj estonteco de la laboro. Lennart Svensson daŭre estos la surloka respondeculo, kaj Anders Rylander kasisto.

Dum la aŭtuna kunveno 2-4 oktobro, okazis du prelegoj: Bengt Nordlöf rakontis pri la kongreso en Bjalistoko, kaj Martin Strid pri Norda Kantaro kunlige kun tonsilaboj kaj aliaj muzikaj fenomenoj.

En la dimanĉo la partoprenantoj faris diversajn praktikajn laborojn en la domo.

La plej urĝaj bezonoj de riparoj en Esperantogården estis jam longe la tegmento kaj la fenestroj. La plej urĝaj riparoj de la tegmento estas faritaj. La fenestroj en parto el la domo estas nun riparataj, kaj momente aspektas malbelaj, sed estis pretigitaj dum la vintro.

En la jarkongreso de SEF en Borlänge, oni jam anoncis ke ĝia jarkongreso okazos en Lesjöfors en 2010. Krome la estraro de Esperantogården preparas nomi laborgrupon por somera kurso en 2010.

Inter aliaj aranĝoj, kiuj alportas tranoktontojn por la gasteja parto de Esperantogården, troviĝos denove la sveda aŭtomobila veturigado en februaro, kiu pasintfoje okazis en alia parto de la lando.

**Ulla Luin**

*La foto maldekstre:  
Ekspozicio en la lingva tago en Västerås.*

## 50 % FLYTTTRABATT PÅ ALLA VÅRA BÖCKER!

50 % på alla böcker fram till 31 december,  
50 % rabato por ĉiuj libroj ĝis la 31a de  
Decembro.

Esperantoförlaget skall flytta sitt lager och erbjuder därför flytttrabatt fram till 31 december 2009. Kanske någon av dina vänner skulle uppskatta en lärobok och ordbok som julklapp?

Aniaro (85 SEK) **42,50 SEK**  
Bona rido (25 SEK) **12,50 SEK**  
Dharmopado (180 SEK) **90 SEK**  
Inter sudo kaj nordo (50 SEK) **25 SEK**  
Islandaj pravoĉoj, bind. (50 SEK) **25 SEK**  
Islandaj pravoĉoj, broŝ. (40 SEK) **20 SEK**  
Jaroj sur tero (50 SEK) **25 SEK**  
Kelkaj faktoj pri la budhismo (85 SEK) **42,30 SEK**  
Kion ajn (70 SEK) **35 SEK**  
La frakseno Igrasililo (200 SEK) **100 SEK**  
Mio, mia filo (125 SEK) **62,50 SEK**  
Nemesis-Nemeza (100 SEK) **50 SEK**  
Ōmotos mission på esperanto (150 SEK) **75 SEK**  
Orm la Ruĝa (130 SEK) **65 SEK**  
Printempo de morto (50 SEK) **25 SEK**  
Tra lando de indianoj, bind. (50 SEK) **25 SEK**  
Tra lando de indianoj, broŝ. (40 SEK) **20 SEK**  
Vivu la stel' (25 SEK) **12,50 SEK**

Dr Esperanto, 'Internationelt språk', faksimil, numrerad (120 SEK) **60 SEK**  
Esperanto! En nyckel till det internationella språket. (20 SEK) **10 SEK**  
Introduktion till esperanto (25 SEK) **12,50 SEK**  
Jen nia mondo 1 (75 SEK) **37,50 SEK**  
Jen nia mondo 2 (75 SEK) **37,50 SEK**  
Jen nia mondo CD (85 SEK) **42,50 SEK**  
Kompendium (100 SEK) **50 SEK**  
Esperanto-svensk ordbok (50 SEK) **25 SEK**  
Etimologia vortaro 1 (140 SEK) **70 SEK**  
Etimologia vortaro 2 (140 SEK) **70 SEK**  
Etimologia vortaro 3 (140 SEK) **70 SEK**  
Etimologia vortaro 4 (140 SEK) **70 SEK**  
Etimologia vortaro 5 (205 SEK) **102,50 SEK**  
Etimologia vortaro 1-5 (585 SEK) **292,50 SEK**  
Lilla ordboken (75 SEK) **37,50 SEK**  
Ordbok Svenska-Esperanto (450 SEK) **225 SEK**  
Porto tillkommer.  
Från 1 januari återgår priserna till de vanliga.  
Betala inte nu. Faktura kommer tillsammans med böckerna.

### ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG  
Postgiro: 578-5 Nätsida: [www.algonet.se/~eldona](http://www.algonet.se/~eldona)  
E-post: [eldona@telia.com](mailto:eldona@telia.com) Telefon: 0705-850054.  
Från 2010 ny adress. Samma e-postadress.

## TRA LA LANDO

### Sommarbrigad i Lesjöfors

Esperantogården i Lesjöfors är i stort behov av reparation och underhåll. Esperantogårdens föreståndare Lennart Svensson tar när som helst emot esperantister som vill komma och hjälpa till med skötseln av gården under några dagar.

Sommaren 2009 var det dags för en större renovering av gården. Därför organiserade jag, Victoria Majby, och Carl Mäsak en arbetsbrigad under sommaren 2009. Tio esperantister från Sverige, Norge och Lettland kom till Lesjöfors för att lägga om taket och byta fönsterkarmarna.

Fler esperantister anslöt sig till brigaden på plats i Lesjöfors. Under fyra intensiva dagar fejade och fixade vi i vårt hus både invändigt och utvändigt. Förutom ett nytt tak och fönster fick husets trädgård en ordentlig genomgång.

Avslutningsmiddagen hölls i trädgården på den nykrattade gräsmattan bredvid den rengjorda dammen.

Arbetsgruppen bakom Somerbrigado en Lesjöfors 2009 vill gärna se att sommarbrigaden på Esperantogården i Lesjöfors blir en årligen återkommande aktivitet där esperantister träffas och arbetar med skötseln av gården. Esperantogårdens framtid är visserligen osäker, men årets sommarbrigad visade att det finns många svenska esperantister som gärna tar hand om det hus som är vårt.

Vi vill särskilt tacka Cato Haugen, som organiserade de norska esperantister som deltog i Somerbrigado en Lesjöfors 2009, packade en hel minibuss full med byggnadsmaterial och körde den till Lesjöfors. Vi vill också tacka Algis Kaspiravicius som såg till att renoveringen av taket sköttes professionellt.

**Victoria Majby**  
Ett foto från brigaden kan ses på omslaget.

### Digital berättartävling

Årets upplaga av Europeiska språkdagen, arrangerad av Internationella Programkontoret, har formen av en tävling i digitalt berättande. Esperantoförbundet är även i år med som en av de medverkande organisationerna.

Tävlingen lanserades på webbsajten [www.thelanguagesinmylife.se](http://www.thelanguagesinmylife.se) den 26 september och löper fram till 31 oktober. Tävlingen är öppen för ungdomar upp till 19 år och går ut på att med valfri teknik – till exempel stillbilder och berättarröst, eller mobiltelefon med videokamerafunktion – skapa en högst 60 sekunder lång film på temat *språken i mitt liv*.

Olof Pettersson

### Sveda filmo kun subtitoloj

Sveda kurtfilmo, "Förstenad" (Ŝtonighinta), aperis kun Esperantaj subtitoloj.

La 7-minuta animita filmo rakontas la historion pri la korpo de Mats Israelsson, kiu malaperis en 1677. Pli ol 40 jarojn poste oni trovis lian korpon en minejo en Falun. La korpo estis en mirinde bona stato kaj ekspoziigis dum 30 jaroj, ĝis oni enterigis lin en preĝejo. Kiam la preĝeja planko ripariĝis en 1860, oni retrovis la restaĵojn de Grand-Mats kaj denove ekspoziigis lin. En 1930 li finfine havis ripozejon en la tombejo.

La filmon faris Joanna Forsberg kaj Dennis Thunholm. Ĝi venkis premion kiel la plej bona animajo dum Dalarna Filmfestival 2009. La filmo ne estas aĉetebla, sed eblas vidi ĝin ĉe Stora Kopparberget en Falun. Ĝi poste publikiĝis ankaŭ en Youtube kun subtitoloj.

La subtitolojn faris Snefrid Holm kaj Kjell Heggvold Ullestad.  
Khu

## Prenumerera!

SEF erbjuder sina medlemmar att prenumerera på esperantotidningar för 2009. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på plusgiro 14 74 29 -5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses. Tyvärr måste jag höja alla avgifter på grund av kronans svaga värde. *Jag skickar gärna provexemplar av någon tidning, om ni hör av er.* Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, Tel 0415-50152.

Tidning	nr/år	pris kr
Esperanta Finnlando	6	225*
Esperanto	11	380
Esperanto en Danio	5-6	130
Femina	4	250
Heroldo	17	410
Juna Amiko (rabatt från 3 ex)	3	145(115)
Kontakto	6	230
La Jaro	1	65
La Kancerkliniko	5	260
La Ondo	11	395
La Ondo rete		125
Literatura Foiro	6	380
Litova Stelo	6	145
Monato	11	500
Monato (retversio)		300
Norvega Esperantisto	6	125
Oomoto, nur rete		senpage
<a href="http://www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf">www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf</a>		
Ret-Ventoĵ		senpage
<a href="http://www.esperanto.hu/eventoj/">www.esperanto.hu/eventoj/</a>		
Scienca Revuo	4	210
TEJO-tutmonde	4	120
Tidningar markerade med *		har inte lämnat prisuppgift för 2010

### Interesa ekraneĵo, kiu montras multon.

Vi bezonas iom da tempo malkovri la diversajn veraĵojn pri kiu oni normale ne pensas. Ĉu Esperanto povas doni respondon al tiuj veraĵoj?

Ekzemple, oni vidas sur unu de la ekranoj (ruĝan) ĉemizon kiu esprimas la svedan eldiron "det kostar skjortan" kaj ĝi celas la enormajn kostojn por tradukoj kaj interpretado en EU.

En la sveda lingvo oni povas prononci la ŝ-sonon en 14 diversaj manieroj, sed en Esperanto ekzistas nur ŝ.

Multe en nia moderna vivo estas normaligita kaj logike aranĝita sed ne en naciaj lingvoj. Kial ne elekti logikan lingvon? Mendu ĝin senkoste. Vi nur pagu la transporton. Vidu foton sur p. 5.

Informas: S:ro Wim Posthuma, Soldatgatan 40, 723 45 Västerås. Telefonoj: hejma: 021 481 4010, portebla: 073 082 7104  
Rete: w.posthuma@esperanto.se

STYRELSENS SPALT

UNIVERSITET

## Rapport från Distanskurser SEF-styrelsen 2010

Svenska Esperantoförbundet har hållit styrelsemöte via Skype (på Internet). Eftersom vår dagordning var lång, delade vi upp den på två möten, 22/9 och 6/10, då vi höll på i cirka två timmar varje gång. Vi satt på var sitt håll i landet, i Borlänge, Uppsala, Stockholm, Västerås, Hjo och Helsingborg, och samtalade obehindrat. Metoden var framgångsrik, och vi kommer att använda oss av den även i framtiden, dock inte vid alla möten.

Några ärenden som var uppe på dagordningen:

\* Datum för nästa års kongress (14 - 16 maj). Platsen bestämdes redan tidigare (Lesjöfors).

\* Tillsättande av kongresskommitté.

\* Rapporter om tagna beslut sedan förra mötet. (Några av oss har beslutsrätt på delegation.)

\* Genomgång av ekonomiska rapporter från vår bokföreläsare och från kassören för Borlänge-kongressen. (Kongressen gick med överskott tack vare flera omständigheter, bl a fler deltagare än beräknat.)

Vi har bestämt att träffas igen via Skype den 3/12. Nästa fysiska möte kommer att bli någon gång i början av nästa år. Då kommer vi bl a att behandla flera frågor rörande verksamheten och framtida projekt, frågor som är mer lämpade att diskutera "öga mot öga"

Ann-Louise

Esperanto-kurserna på Stockholms universitet kommer att ges igen under 2010, denna gång helt på distans. Det spelar alltså ingen roll var man bor i landet, bara man har tillgång till en dator med internetuppkoppling kan man gå kurserna. Mer information finns på [http://ikso.net/~hokanx/su\\_eo\\_folio.doc](http://ikso.net/~hokanx/su_eo_folio.doc).

Det vore toppen om även du som redan kan (en del) esperanto ville anmäla dig till kursen "Esperanto I, 30 hp" och på det sättet stödja både esperanto och din egen esperantoutveckling! Delkursen "Introduktion till esperanto" behöver du inte ägna så mycket tid om du redan kan grunderna i esperanto. Delkursen "Interlingvistik och konstruerade språk" ger baskunskaper kring interlingvistik som är bra att känna till för alla med esperantointresse. Under delkursen "Fortsättning i esperanto" används den utmärkta boken "Vojaĝo en Esperanto-lando" av Boris Kolker och även en ny grammatikbok av Bertil Wengnergren som ger en grundlig genomgång av hela språket. I den sista delkursen "Realia i esperanto" får du chansen att fördjupa dig i ett valfritt ämne med anknytning till esperantorörelsen.

Låter det intressant? Besök i så fall <http://sisu.it.su.se/> och sök på "esperanto", där kan du anmäla dig till kursen "Esperanto I, 30 hp".

Har du frågor, skriv gärna till [su2010@lernu.net](mailto:su2010@lernu.net).

Hokan Lundberg  
(en av lärarna på kurserna)





# La reviviĝo de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo

*En ses jaroj SEJU ŝanĝiĝis de malkreskanta kaj disiĝinta unuiĝo, al aktiva, engaĝita kaj kuntenata. Ne pro mi, aŭ pro alia unuopulo, sed danke al tio, ke SEJU antaŭ tri jaroj alfrontis morton, kaj returnis sin kun klara celo. Post duonjaro mi demisios kiel prezidanto, do mi prenas la okazon priskribi tri aferojn faratajn de SEJU kiuj ŝajnas funkcii tre bone.*

Sed unue: kiumaniere ni alfrontis morton? La SEJU-estraro havis precipe malfacilan generacian ŝanĝiĝon dum la periodo 2005-2006, parte ĉar la laboro fluis malbone kaj homoj ne bone traktis respondecojn. Finfine restis nur du en la estraro. Dum kio devus esti la plej sinistra momento en la unuiĝo, ni sidiĝis kaj surpaperigis ĉiujn ideojn, kiujn ni povis pripensi. Unu el tiuj ideoj efektive savis la unuiĝon.

Estis ideo okazigi renkontiĝon en Hernusando. Ĝi estis nomata "Oranĝa Renkontiĝo", kaj fariĝis agrabla, sukcesa renkontiĝo kun homoj kaj de Svedio kaj de eksterlande. La Hernusanda Esperantista Klubo kaj SEJU kune aranĝis du tiajn renkontiĝojn post tiu unua, kaj ĝi fariĝas pli bona kaj pli rava jaron post jaro.

Per Oranĝa Renkontiĝo ni solvis ŝajne nesolveblan problemon: kiel la estraro organizu renkontiĝojn kiam ni eĉ ne emas pritrakti la kutimajn farendaĵojn? Kun la Oranĝa Renkontiĝo la disdivido de laboro estas evidenta: la Hernusanda klubo aranĝas lokon kaj aĉetas manĝon, dum SEJU aranĝas pri ret-paĝo, reklamdisvastigo kaj ekonomia apogo. Ambaŭ tiuj taskaroj estas grandaj, sed unuope ili lasas sin pli facile esti faritaj.

La sama tipo de samaranĝo okazis ĉi-printempe inter SEJU kaj la SEF-a jarkongreso, en la formo de Anemona Renkontiĝo. Ĝi estis ankaŭ sukcesa, kaj multaj el ni esperas je ripeto en 2010.

Jen la unua afero kiun ni faras nuntempe kiu bone funkcias: ni renkontiĝas ofte.

Dum la ege interesa diskuto en Borlänge pri la estonteco de esperanto-asoci-Svedio, mi ekkom-prenis aferon, kiun mi ankaŭ depodie dividis kun la kongresanoj: nia malabunda rimedo estas kuna entuziasmo: troviĝas pluraj solaj herooj hodiaŭ en Svedio kiuj ĉiutage tiras enormajn ŝarĝojn por la kaŭzo, malrapide sin ĉerpantaj ĉar iliaj penoj ne estas sufiĉe rimarkitaj kaj valortaksitaj. Kutimaj renkontiĝoj altgrade solvas tiun problemon: subite oni ne estas izolita unuopulo, sed Esperantisto inter Esperantistoj.

Kaj landaj kaj regionaj renkontiĝoj kontribuas al konservo kaj kultivo de la entuziasmo. De Oranĝa Renkontiĝo naskiĝis la regiona Nerdia Renkontiĝo, kiu jam okazis ĉiumonate dum pli ol jaro. Se ne ekzistus Nerdia Renkontiĝo, probable nek okazus Anemona Renkontiĝo.

La alia afero kiun ni faras nuntempe estas paroli esperanton senĉese. La tutan tempon. La koncepto "krokodili" fariĝas preskaŭ sensenca kiam ĉiuj ĉeestantoj tiel klare orientiĝas al atingi la senton de komunumo. Same klare ni estas toleremaj al novuloj... sed eĉ tiuj ŝajnas alproprigi la lingvon plej rapide, ĝuste ĉar la celo tiel evidente estas uzi la lingvon, kaj aparteni en la komunumo.

Mi konfesu ke mi mem turniĝis tute en tiu ĉi demando. Antaŭ nur jaro mi opiniis ke ne havas apartan sencon strikte uzi nur Esperanton en ĉiuj cirkonstancoj, se la sveda taŭgas same bone. Tio kio okazis de post tiam estas ke ĉiuj renkontiĝoj havigis al ni kunan identecon, kiun ni plifortigas per la lingvo. Ren-

kontiĝoj kondukas al plia uzado de la lingvo.

Mi antaŭ nelonge lernis novan vorton: 'ohana. Ĝi estas de la havaja lingvo, kaj signifas "etendita familio, ne necese difinita de biologia rilato, sed de intencaj ligoj inter personoj kiuj celas kunlabori kaj memori unu la alian". Tiel sentiĝis la pasinta Oranĝa Renkontiĝo por mi; ne kiel amikaro, sed kiel unu granda ohana.

La tria afero kiun ni faras nuntempe estas fluliniigi la estraran laboron kaj la administrativajn koncernojn de la unuiĝo. La origino estas ke ni ĉiuj estas profunde pigraj, forgesemaj kaj ĝenerale okupitaj, kaj vere ne ŝatas paperlaboron. Por plifaciligi la taskojn ni uzas komputilojn kaj la Interreton, kaj modernajn teknologiojn kiel PHP, SVN, Trac kaj RSS. Sed la specifaj teknologioj ne helpas eĉ iomete se ni ne ankaŭ sinkroniĝas unu kun la aliaj. Tial la estraro ĉiusemajne babileje kunsidas dum 15 minutoj. Estas nedeve veni, sed preskaŭ ĉiuj venas ĉiun fojon. Tiu ĉi nova kutimo mirakle transformis la vivecon de la estraro.

La jarkunveno de SEJU ĉi-jare daŭris 10 minutojn. Aŭ 9 minutojn kaj 50 sekundojn, pli precize. Sed sidante tie, ne ĝojigis min plej la terura efikeco sed tio, ke ni estis dudeko da partoprenantoj. Jes, ni estis rapidaj kaj tre bone preparitaj, sed pli gravas ke ni estis kune, kaj amuziĝis.

Ĉar tio estas la tuta afero.

Carl Mäsak





## Oranĝe en Hernusando

De la 28-a ĝis la 30-a de aŭgusto okazis la Oranĝa Renkontiĝo en Hernusando (Härnösand), Svedio. Organizis la renkontiĝon Hernusanda Esperantista Klubo kaj SEJU. Partoprenis pli ol dudek homoj el kvin landoj.

La renkontiĝon enkadrigis bela naturo, inkluzive bela lago. Kanotado en ĝi estis unu el la programeroj; aliaj estis nokta kaj matena naĝado, lingva gimnastiko, mondĉampionado de bakio (ŝakeca bretludo), piedpilkado, koncertoj de La Perdita Generacio kaj de Inicialoj DC, poezilegado de Sara Török, kaj prelego pri la Oranĝa Revolucio en Ukrainio.

KONGRESS 2010

## 14-16 maj på Esperntogården i Lesjöfors

Redan nu kan La Espero meddelata att svenska esperantokongressen 2010 äger rum 14-16 maj på Esperantogården i Lesjöfors. SEF:s årsmöte hålles lördagen den 15/5.

Ytterligare information om kongressprogram och avgifter kommer i La Espero 2010-1.

Kongresskommitten består av Bengt Nordlöf, Anita Dagmarsdotter, Wim Posthuma och Ulla Luin. Kommittén kommer att ha intensiv kontakt med Lennart Svensson i Lesjöfors. Det kommer att behövas fler frivilliga medhjälpare.

NEKROLOGO

## Sven Samelius (1916-2009)

Pro apopleksio Sven Samelius mortis en Norrköping la 18-an de oktobro 2009. Li esperantiĝis komence de la 30-aj jaroj en sia naskiĝloko Ardre sur Gotlando kaj restis tre aktiva esperantisto dum sia tuta vivo. En la Esperantoklubo de Norrköping, kie li estis membro ek de 1978, li partoprenis preskaŭ ĉiujn niajn aranĝojn ankaŭ dum sia lasta vivjaro. Por la internacia esperantistaro li fariĝis konata pro siaj belegaj poŝtkartoj sub la titolo "Stokholmo estas mirinda!" kiuj vendiĝis kaj disvastiĝis milope tra la tuta mondo dum la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo 1980. Kiel profesia fotisto li verkis plurajn fotolibrojn i. a. pri Gotlando kaj, kune kun sia fratino Gulli, pri Nov-Zelando. Liajn tre altkvalitajn fotojn oni ankaŭ povas trovi diversloke alie, ekzemple en Nationalencyklopedin kaj Encyclopædia Britannica. Ĉiam afabla kaj bonhumora li estis tre populara kaj aprezata persono ne nur en esperantistaj rondoj sed ankaŭ ĉe diversaj eldonoj.

Haldo Vedin

PS Ekzemplon de la subtila humuro de Sven mi memoras de iu kluba estrarkunveno kiam ni malkvietiĝis pri la fakto ke mankis programo por unu el la venontaj monatkunvenoj. La tiama prezidanto proponis ke ni ĉiuj kontribuu per mallongaj programeroj kaj ke ni per tio solvos la problemon. Sven tuj deklaris sin preta helpi kaj diris: "Mi povas kontribui per kaftrinkado."

HV

## Bokgavor till bibliotek

Esperantoförlaget har med hjälp av esperantister runt om i Sverige överlämnat bokgavor till bibliotek runt om i Sverige.

59 bokpaket är utskickade till esperantister. 25 bibliotek har skrivit och tackat för böckerna. För 36 paket har vi inte fått något besked om att de överlämnats.

Om någon av er fortfarande har paket liggande hos sig hemma, ta er gärna tid att överlämna dem till något bibliotek och be dem att höra av sig till eldona@telia.com så vi vet vart paketen har tagit vägen.

Styrelsen för Esperantoförlaget

## Universala Kongreso de Esperanto i Havanna den 17-24 juli 2010

Anmälningavgifter (svenska kronor)

	/12 -09	-31/3 -10	1/4 -10
1. Direkt medlem i UEA(ej MG)	1665	2080	2500
2. Icke direkt medlem i UEA	2080	2600	3120
3. Medföljande, handikappad eller ungdom(född mellan 80-01-01 och 89-12-31), som är medlem i UEA	835	1040	1250
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är medlem i UEA	1250	1560	1875

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 89-12-31 betalar ingen kongressavgift. Anmälningblankett för kongressen kan beställas hos:

Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, tel. 0415-50152

Eftersom kurserna är så osäkra kan avgifterna komma att justeras.

## Ĉu Obama esperantisto?

La kontraŭuloj de la usona prezidento Barack Obama jam de longe akuzas lin pri socialismo, naziismo, islamismo kaj planado de koncentrejoj por nekonsentantoj. Nun aperis nova akuzo: Obama ne nur estas nazio, sed li krome intencas devigi ĉiujn usonanojn lerni Esperanton. El satiraj tekstoj, mokantaj la oponentojn de Obama, la aserto rapide migris al la arsenalo de la efektivaj kontraŭuloj de la freŝa Nobel-premiito.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

## Medvedev diras ne al Esperanto

Se Rusio oficiale ekuzas Esperanton en internaciaj rilatoj, tio signifus libervolan fordonon de unu el la atributoj de nacia suvereneco, la propra lingvo. Tiel argumentas kontraŭ Esperanto la oficejo de la rusia prezidento Dmitrij Medvedev, responde al letero de Rusia Esperanto-Unio. En sia letero la esperantistoj esprimis sian zorgon pri la kreskanta potenco de la angla lingvo kaj pri la malhelpoj, kiujn renkontas instruado de Esperanto en rusiaj altlernejoj. La prezidenta letero respondas al komplete aliaj demandoj ol tiuj starigitaj de REU, ŝajnigante ke esperantistoj volas ĉesigi la uzon de la rusa lingvo en internaciaj rilatoj.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

## UEA ĉe Unesko

La 6-an de oktobro okazis en Parizo la inaŭguro de la 35-a Ĝenerala Konferenco de Unesko, kiu daŭros ĝis la 23-a de oktobro. Tiu ĉi supera organo de la organizaĵo kunvenas ĉiun duan jaron kunigante reprezentantojn de la 193 membroj-ŝtatoj por difini la politikon kaj

agadprogramojn de Unesko. La plej interesa decido de la nuna konferenco sendube estos la elekto de nova ĝenerala direktoro por anstataŭi la japanan diplomaton Koïchiro Matsuura, kiu okupas la postenon ekde 1999. Antaŭvideble Unesko estos unuafoje gvidata de virino, ĉar kiel la solan kandidaton ĝia plenumkomitato proponas ambasadorinon Irina Bokova el Bulgario. La formala elekto okazos la 15-an de oktobro.

Ses personoj reprezentas la mondan esperantistaron en la konferenco. Pro siaj oficialaj rilatoj kun Unesko, Universala Esperanto-Asocio estas aŭtomate rajtigita partopreni la Ĝeneralan Konferencon kiel observanto. Nome de UEA ĉeestas Renée Triolle, Barbara Despines kaj Estelle Loiseau. Unesko invitis ankaŭ Internacian Ligon de Esperantistaj Instruistoj, kun kiu ĝi daŭrigas rilatojn sur neformala bazo. Kiel siajn reprezentantojn ILEI delegis Monique Arnaud, Jean-Pierre Boulet kaj François Lo Jacomo.

## Pli da filmoj ĉe UEA

La 6-an de oktobro aperis la 5-a numero de la filmjurnalo UEAviva kun tri eroj. Unue Emilio Cid raportas pri la rezultoj de la informkampanjo ĉirkaŭ la 94-a UK en Bjalistoko, al kiu li alvokis laŭ komisiono de la Estraro de UEA en la filmjurnalo en majo. Cid estas sufiĉe kontenta pri la rezultoj kaj instigas plu daŭrigi la agadon ankaŭ nun, kiam la UK jam apartenas al pasinteco. En la dua ero, pruntita el la televida servo de UN, oni vidas elpaŝon pri lingvaj rajtoj fare de la UEA-representanto Mireille Grosjean ĉe la Homrajta Konsilio de UN fine de septembro. La fina parto estas dediĉita al TEJO. Oni vidas sinprezenton de la nova Estraro de la junulara sekcio de UEA.

La reta kinejo de UEA ĉe Ipernity pliriĉiĝis per valoraj

historiaj dokumentoj. La filmo Lingvo festis naskiĝtagon de Michael Cwik raportas pri la impona UK de la Jubilea Jaro 1987 en Varsovio. Scenojn el la Budapeŝta UK en 1966, i.a. kun fragmento el la festparolado de Ivo Lapenna, montras la filmo Esperanto-fonto, kiu unuavice rakontas pri la eventoplana historio de nekutima ZEO apud la hungara ĉefurbo. La plej lasta el la novaĵoj en la reta kinejo estas samtempe la plej malnova el ili, nome dokumenta filmo pri la 48-a UK en Sofio en 1963. Ĉiuj ĉi trezoraĵoj devenas el la Biblioteko Hodler, kies filmojn UEA iom post iom ciferecigas por pli facile disponebligi ilin al la movada publiko.

La adreso de la reta filmjurnalo en YouTube estas [www.youtube.com/user/UEAviva](http://www.youtube.com/user/UEAviva) kaj tiu de la reta kinejo en Ipernity [www.ipernity.com/home/97850](http://www.ipernity.com/home/97850).

## Akcepto en la pola ambasado

Omaĝe al la 150a jubileo de L.L.Zamenhof kaj lige al la Tago de Eŭropaj Lingvoj, la pola ambasadoro Adam Halamski kaj la prezidantino de la Dana Esperanto-Asocio Ileana Schröder invitis al akcepto en la pola ambasadejo en Kopenhago la 25-an de septembro.

Post bonvenigaj vortoj de ambasadoro Halamski kaj prezidantino Schröder, kun interpretado el kaj en la pola fare de Stanislaw Mielczarek, la prezidanto de EEU dr. Sean O'Riain parolis pri L.L.Zamenhof kaj la ĝisnunaj atingoj. Kim Henriksen ludis polajn popolkantojn kaj s-ro Mielczarek deklamis la poemon "La vojo". Ni finis la programon per kantado de la esperanta himno "La espero" kaj "La Himno al Eŭropo".

Dum kiam ni havis eblecon interbabili la ambasado regalis nin per bongustaj manĝaĵetoj kaj trinkaĵoj. Partoprenis proksimume 50 personoj, plejparte danaj esperantistoj.

Ann-Louise Åkerlund

## Kristen esperantoträff

**Den ekumeniska (samkristna) esperantokongressen ägde i år rum i Wrocław, Polen, 18-25 juli 2009. Arne Lundkvist, medlem i Värnamo Allianskyrka, som deltog, skriver:**

Med Ryanair flög jag den 20 juli från Skavsta flygplats till Wrocław. Med buss och spårvagnar tog det en timme att komma till kongresslokalen, som var ett prästseminarium. Vi var 220 deltagare. Av dessa var vi 35 KELI-medlemmar, d.v.s. kristna protestantiska esperantister. Katolikerna dominerade helt.

Invingningen varade tre timmar och det var flera tal från politiker, som tolkades till esperanto. Varje morgon hölls en mässa med nattvard.

På måndag fm. höll KELI:s ordförande Philippe Cousson föredrag över kongress temat tro, hopp och kärlek. Sedan följde föredrag av prof. Bojidar Leonov om de ortodoxas liv och tro. Vi fick sedan gå till den ortodoxa kyrkan. Prästen där berättade om alla ikoner. Därpå följde en gudstjänst.

På eftermiddagen hade vi en stadspromenad under 4 timmar. Det var + 30 grader men efter en timme blev det ösregn, då vi kunde ta en paus vid uteserveringarna.

På tisdagen höll pastor Forycky föredrag om hopp för världen enligt påven Benediktus den XVI. Sedan följde ett föredrag av prof. Dudich om jord, himmel och hopp. Vi gick sedan till en katolsk kyrka, där vi hade gudstjänst. På em. talade Dudich om att älska och handla som Albert Schweitzer och moder Teresa.

Det blev också tid för många konserter och utflykter.

Katoliker och protestanter hade sina årsmöten samtidigt men i skilda rum. KELI:s kassör Krüger hade föredrag om Boenhoffer och ekumenik. En kvinna talade om Franciskus.

Arne Lundkvist

## Ĵomart kaj Nataŝa

Ĵomart kaj Nataŝa estas duopo kiu komencis kanti en esperanto en 1987 en Kazahio. Antaŭ tio, de 1983, ĵomart kantis unue sola, kaj poste kun sia esperantorokgrupo Kredo. La duopo devenas el Kazahio, kie ili multe vojaĝis koncertante dum diversaj e-aranĝoj. Tie ili aperigis la plej unuan en tiama Sovetio vinilan diskon Somera mondo (1989). En la jaro 1991 la paro translokiĝis al Svedio kie ili eldonis tri kasedbendojn kaj 2 lumdiskojn Valso por amikoj (vkdd 28) en 2000, kaj Amu min (vkdd65) en 2003.

ĴomArtaĵoj - la Ruĝa albumo estas la unua KD el serio de tri planataj. ĝi celas reludon kaj rekantadon de ĉiuj iliaj plej ŝatataj kantoj iam registritaj el jam elĉerpitaj kasedoj kaj KDoj. La plejparto de la kantoj sur ĉi tiu kaj planataj albumoj estos malnovaj, bone konataj kaj ŝatataj. Kelkaj kantoj ŝanĝiĝis survoje, ja ili kantas ilin jam dum pli ol 20 jaroj! Kompreneble la aranĝoj de la kantoj estas pli modernaj kaj pli riĉa ol antaŭe. La registrado estas pure akustika kaj la intenco estas krei la saman varman kaj intiman etoson kiun oni sentas dum iliaj koncertoj. Jen do remalkovru, aŭskultu, kaj ĝuu la unuan KDon de la kolekto!

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi:

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd94&lng=e>

### ANONCETO

#### KÖPER!

Äldre esperantolitteratur. Söker särskilt hela årgångar eller lösa nummer av tidskrifterna *Literatura Mondo* och *Malgranda Revuo* samt böcker utgivna på förlagen *Literatura Mondo* och *ekrelo*.

Kontakta: Tomas Jansson, mobil: 0730-629192

## UEA restarigas laborgrupon ĉe UN

En la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj funkciis tre aktiva laborgrupo de UEA ĉe la ĉefsidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. Inter la pintaj agantoj tiam estis Humphrey Tonkin. Nun sub lia gvido estas starigata nova laborgrupo, kiu jam faris siajn unuajn paŝojn. Humphrey Tonkin volas ne nur pli intense informi Unuiĝintajn Naciojn pri Esperanto, sed ankaŭ pliigi la informadon al esperantistoj pri la laboro de Unuiĝintaj Nacioj. Probal Dasgupto bonvenigas la iniciaton: "Por ke oni restu ano de la monda organizaĵara parlamento, oni devas laŭtaŭge ofte aŭdigi sin, sed ankaŭ aŭskulti la aliajn."

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

## Grafitio Esperante

Grafitio pri Esperanto kaj bildaj vortaretoj desegnitaj de infanoj – jen la ĉefaj eroj de laborrenkontoj okazintaj en Varsovio. Septembre organizis ilin Historia Muzeo de Polaj Judoj kaj Pola Esperanto-Junularo kadre de la 13-a Scienca Festivalo. Dum kvar renkontiĝoj la eventon partoprenis klasoj el bazlernejoj kaj gimnazioj, kaj familioj kun infanoj.

[www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

# Novaj tempoj

Tatjana Nikolajevna Sulokina, 70-jaraĝa virino kun pompa hararanĝo el kupre farbitaj haroj, vekigis hodiaŭ matene pli frue ol kutime: kvazaŭ iu estis puŝinta ŝin kaj forpelinta la sonĝon. Ŝi ne estis satdorminta kaj ripozinta, tamen denove ekdormi ŝi ne plu sukcesis. Estis sabato kaj ŝi ne devis iri al la laborejo. Pensante pri la laboro, ŝi profunde ekĝemis: ŝi ja estas de jam dek kvin jaroj pensiulino, tamen ĝis nun ŝi devas labori, ĉar la mizera pensio ne sufiĉas por transvivi. Tiu ĉi pensio, ripetis ŝi ofte, estas tro granda por malsatmorti, sed tro malgranda por vivi plu.

Ĝenerale ŝia nuna laboro ne estas peza – ŝi vendas en polikliniko plastajojn por protekti ŝuojn –, sed malfacile estas atingi la laborejon, ĉiu paŝo dolorigas ŝiajn ŝvelintajn krurartikolojn. Aldone, se estas frosto ekstere, tiam oni glitas survoje kaj ĉiupaŝe riskas fali kaj rompi la gambojn. Sed aparte malfacile ŝi suprengrimpas la altan ŝtupareton de trolebuso, per kiu ŝi veturas al la laboro.

Tatjana leviĝis, surmetis negliĝon, ŝaltis lumon kaj rigardis al la horloĝo: kvara horo de mateno. Ŝi iom kombis la harojn, rigardante sin en la spegulo: ŝi aspektas ne malbone, flegita vizaĝo kun malmultaj sulkoj. Neniu taksas ŝin pli aĝa ol sesdek jarojn, nur la eluzitaj manoj kun dikaj vejnoj, la manoj, transportintaj en sia tuta vivo dekojn, verŝajne eĉ centojn da tunoj, montras ŝian veran aĝon.

Ekstere falis malseka neĝo, kiu rapide formis sur la malglata, deformita de aŭtoj asfalto de la trotuaro grandegajn netrapaseblajn flakojn. Eĉ starante ĉe la fenestro en sia loĝejo Tatjana Nikolajevna vidis, kiel malvarmhumide, malpure kaj malkomforte estas surstrate. Bone, ke ŝi hodiaŭ nenien devas iri, eble nur mallonge por aĉeti panon aŭ viziti fratinton en la najbara strato.

Tatjana metis sur la fornon akvon por la teo, kaj sidante sur la kuireja tabureto, enprofundiĝis en siajn pensojn. Neniĝis ŝi pensis, ke ŝi devos pasigi sian maljunaĝon en tia mizero, ŝi, kiu laboris 47 jarojn kaj eĉ havas la medalon “Heroo de laboro”.

Kiel juna virino ŝi translokiĝis el vilaĝo en proksiman urbon, ĉar ŝi volis vivi bone, pure kaj ne okupiĝi pri brutaro. En la vilaĝo restis ŝia familio: gepatroj kaj fratinoj. Ŝi tiutempe estis ĵus edziniĝinta al Petro, najbara junulo el ilia vilaĝo, kaj ili, junaj kaj fortaj, rapide trovis en la urbo laboron. La unuajn jarojn en la urbo ili laboris en riparmetiejoj, ĉar tie oni enskribis ilin en la vicon por loĝejo. La laboro estis malfacila, en tri skipoj, ili veldis kaj riparis busojn. Aparte malfacile estis labori nokte kaj dum frostoj.

Tiel, atendante, kiam venos ilia vico por ricevi la loĝejon, ili laboris tie ok jarojn, luante la tutan tempon multekostan privatan loĝejon, kie naskiĝis ilia filino Toma. Tatjana bone memoras, kiel ŝi, kiam la filino estis malgranda, je la kvara matene vekis la edzon por ke li iru eksteren por atendi la aŭton kun lakto. En tiuj tempoj oni ne povis aĉeti lakton en vendejo, pro tio homoj eliradis el la hejmoj frumatene dum neĝostormo aŭ pluvo por aĉeti freŝan lakton, kiun oni alportis el vilaĝoj.

Kiam ili finfine “perlaboris” tiun ĉi unuĉambran loĝejon, en kiu Tatjana ĝis nun loĝas, la filino havis jam 6 jarojn. Ricevinte la loĝejon, ili ĉesis labori en riparmetiejoj, Petro trovis bonan laboron en milituzino, kaj ŝin oni sendis al kursoj, kie ŝi lernis la profesion de kuiristo. De tiam ŝi laboris sian tutan vivon kiel kuiristino, de komencantino ĝis poste, konstante plialtigante sian kvalifikon, ŝi iĝis fine la ĉefkuiristino de la manĝejo “Mevo”. En tiu ĉi tempo ŝi havis jam multajn lernantojn, tutan

kuirlernejon. Ŝi ridetas, rememorante, kiel foje venis al la manĝejo kontrolkomisiono, kaj la ĉefo demandis ŝin:

“Tatjana Nikolajevna, ĉu vi povas klarigi al mi, kial ĉe vi ĉio tiel bongustas? Ekzemple tiu ĉi brasiksupo? Ni ja multajn manĝejoj vizitas, kontrolante la kvaliton kaj guston de manĝaĵoj, sed nenie la manĝo tiel bongustas kiel ĉe vi!”

“Mi ja, Semjon Petroviĉ, en tiun ĉi brasiksupon mian tutan animon metis!” respondis ŝi simple, vilaĝanece. Ĉiuj ekridis pro tia paradoksa klarigo: ĉu eblas spici la supon per la propra animo? Nu, kial ne? Se oni laboras kun bona humoro, metante en la laboron siajn emociojn, tiam la rezulto devas ja esti bona!

Tiu tempo, kiam ŝi kaj la edzo alproksimiĝis al la kvardekjaraĝa limo, estis verŝajne la plej feliĉa en ilia vivo. Ili ambaŭ havis kontentigan laboron, la edzo, altkvalifikita metallaboristo, lukris en la milituzino ege bone, la filino kreskis kaj frekventis la mezlernejon. Finfine venis atingita per streĉa kaj multjara laboro bonstato, eĉ prospero, kiam oni ne devis pensi pri ĉiutaga pano, kiel en la malsataj postmilitaj jaroj; kiam oni havis malgrandan, sed propran hejmon; kiam oni povis permesi al si aĉeti bonkvalitan mantelon, robon, aŭ eĉ mendi ilin ĉe tajlorino; kiam oni povis, unufoje dum dek jaroj, ferii en multekosta mara ripozejo. La kreskanta filino ankaŭ ne konis rifuzojn al siaj deziroj: la plej bonaj somerripozejoj, la plej modaj vestaĵoj kaj la plej bongusta manĝaĵo estis en ŝia dispono. Eĉ multekostan usonan ĝinzon, por kiu oni oferis la tutan monatan salajron de la edzo, ŝi sukcesis havigi al si per postuloj kaj ploroj.

Sed ne ĉiu havis tian bonan vivon. Ŝia plej ŝatata pli aĝa fratino Daŝa, kiu, edziniĝinte, migris kelkmil kilometrojn for en Kazahion, ne tiel bonŝancis: ŝia

edzo komencis drinki kaj trafis en malliberejon. Daŝa restis en fremda lando tute sola kun eta filino, sen loĝejo, preskaŭ sen mono, sen iu ajn subteno. Ne estis facile por ŝi vivi en fremda kulturo, kaj ne estis mono kaj fortoj por reveni al la patrujo. Tatjana helpis al la fratino kiel ŝi nur povis: skribis al ŝi gajajn leterojn, sendis vestaĵojn kaj pralinojn, de tempo al tempo telefonis al ŝi. Sed la vivo de Daŝa estis malfacila, kontraste al tiu de Tatjana.

Tatjana en tiuj jaroj estis ĝoja, vivoplena kaj bela virino. Krome ŝi estis grandanima kaj gastama, ŝi ŝatis akcepti gastojn, kuiri por ili, pro tio ili ofte havis gastojn. Krome en ilia unuĉambra loĝejo ofte vivis dum semajnoj kaj monatoj parencoj aŭ konatoj, kiuj troviĝis en malfacila situacio. Foje iu konatino el Moskvo, rompinte gambon, vivis dum du monatoj ĉe ili, ĝis ŝi resaniĝis kaj povis denove labori. Alian fojon 18-jara amikino de ŝia filino vivis ĉe ili ses monatojn, dum ŝi studis en ilia urbo. Ofte ĉe ili loĝis parencoj, kaj ĉiuj akceptis la gastamon de Tatjana kiel ion memkompreneblan, sen aparte danki aŭ rekomplaci ŝin.

La filino plenkreskis kaj, kun malfacilaĵoj fininte la lernejon, tuj fulmrapide edziniĝis kun siaj 18 jaroj. Lerni plu ŝi ne volis, pasigis duonan jaron hejme, kaj poste eklaboris kiel tajpistino. Ankaŭ la bofilo ne havis profesion, kaj Petro helpis al li trovi laboron en sia uzino. La juna paro ekloĝis kun ili en ilia unuĉambra loĝejo, por tio oni devis dividi la ne tro grandan ĉambron. La junaj geedzoj estis pigraj, kaj malgraŭ tio, ke ili ambaŭ laboris, lui apartan loĝejon aŭ ĉambron ili ne volis, ĉar tie oni devus pagi. Sed ĉe Tatjana kaj Petro ili loĝis senpage, elspezante la proprajn salajrojn nur por siaj bezonoj: por multekostaj vestaĵoj, manĝo, amuzveturoj al Moskvo. Kiam Tatjana petis la junan paron almenaŭ parteton pagi por la manĝo kaj loĝejo, tiam Toma paŭtis kaj demandis: "Por kiu celo vi, patrino, bezonas monon? Vi kaj la patro estas jam maljunaj, sed ni, junuloj, bezonas monon por diversaj logaĵoj..." kaj neniam donis monon. Tatjana kaj Petro

estis tiam iom pli ol kvardekjaraĝaj. La filino kaj bofilo estis tipaj parazitaj, kiuj en la vivo nur prenis kaj postulis ion de aliaj, nenion donante mem. Tiu ĉi komuna vivo kun la juna egoisma generacio estis malfacila ekzameno por Tatjana kaj ŝia edzo.

Petro jam delonge staris ĉe sia uzino vice por ricevo de pli granda, triĉambra loĝejo, kaj kiam post kvin jaroj da komuna vivo finfine alvenis lia vico, li kaj Tatjana decidis rezigni pri la nova loĝejo por si mem kondiĉe, ke la filino kun bofilo ricevos apartan unuĉambran loĝejon. La juna paro translokiĝis en novan loĝejon, tamen la nepon Miŝka, naskitan unu jaron antaŭe, ili lasis al Tatjana, klarigante, ke la infano malhelpas al ili. Ili volas vespere iri al kinejo aŭ renkontiĝi kun amikoj, por la infano povas zorgi la geavoj, ili ja tutegale havas nenion por fari. Tatjana entute ne povis kompreni, kial tiuj egoistoj havigis al si infanon. Ŝi kontraŭstaris, kiel ŝi nur povis, sed finfine ŝi prenis la etulon al si, ĉar ŝi bedaŭris lin kaj vidis, ke liaj gepatroj lin tute ne bezonas. Do, ŝi kaj Petro edukis la infanon en sia unuĉambra loĝejo. Nun Miŝka estas plenkreska, loĝas aparte, kaj al edukinta lin avino eĉ dum festoj ne venas. Li iĝis same egoisma kiel la filino. Tatjana ofte pripensas, kial ĝuste ŝia filino estas tia, avara kaj senkora? Ŝi observis en sia laborejo multajn junajn virinojn, sed neniam ŝi renkontis tiel arogan kaj malagrablan inon, kiel ŝian filinon. Ja Tatjana mem neniam diris al ŝi "ne": la filino ĉiam ricevis, kion ŝi volis. Sed nun Toma, kiu por si mem aĉetas plej multekostajn aĵojn, por la patrino, kiam tiu petas ŝin pri helpo, havas ĉiam nur la solajn vortojn "Ne! Vi ne bezonas!" vortojn, kiujn ŝi mem neniam aŭdis de la patrino en sia infaneco.

Tatjana envias sian fratino Daŝa, kiu post multaj jaroj da vivo en Kazahio, pensiiginte, sukcesis reveni al la patrujo kaj nun loĝas ne tro for de Tatjana. La filino de Daŝa, kiu loĝas en fora urbo, konstante helpas ŝin: aĉetas por ŝi vestaĵojn, ŝuojn, sendas al ŝi monon. Ankaŭ al

Tatjana la nevino aĉetis novan sofona, ĉar la malnova, dudekjaraĝa, preskaŭ disfalis. Dum jaroj Tatjana petis la filinon kaj la bofilon helpi al ŝi ripari la sofona, ĉar ŝia pensio ne sufiĉis por tio. Vane! Sed la nevino ne nur riparis, sed eĉ aĉetis la novan sofona, malgraŭ ke ŝi ne ricevas pli grandan salajron ol la filino de Tatjana. Antaŭ semajno, kiam Tatjana vizitis la fratino, tiu montris al ŝi novan mantelon, kiun donace sendis al ŝi la filino. Tatjana tuj ekploris, dirante tra la larmoj: "Sed mi... mi ne bezonas novan mantelon, ne, ne, mi ne bezonas!" Daŝa diris, ke ili alterne povas surmeti ĝin, kaj tuj pruntedonis al Tatjana la mantelon. Tamen Tatjana ne komprenas, kial la filino de Daŝa estas tute alia ol la ŝia? Kion Daŝa faris alie? Pro tiu nekompreneblo Tatjana ne ŝatas la nevino, kaj ju pli la nevino helpas kaj kompatas ŝin, des pli Tatjana malŝatas ŝin.

Deflankigante de siaj pensoj ŝi rimarkis la jam delonge bolantan akvon, malŝaltis la gasflamon kaj faris al si fortan teinfuzadon. Malgraŭ ke ŝi havas belan fajencan teservicon, ŝi ŝatas trinki la teon el simplaj facetitaj glasoj, el kiuj ŝi trinkis la teon sian tutan laborvicon en sovetiaj manĝejoj. Ŝi ŝmiras al si buterpanon, manĝetas kaj denove enprofundiĝas en siajn malfacilajn rememorojn.

Labori kiel pensiulino Tatjana Nikolajevna neniam planis. Jardekoj da laborego, dum kiu ŝi ne nur kuiris, sed ankaŭ portadis pezegajn gigantajn kaserolojn, sufiĉis. De tiam ŝi havas dolorojn en la vertebraro kaj en la krurartikoj. Ŝi ĉiam revis, kiel ŝi ripozos dum sia pensiigo. Sed kiam ŝi emeritiĝis, venis strangaj, nekompreneblaj novaj tempoj: la lando disfalis, la socia sistemo kolapsis, kaj la tuta popolo, kaj aparte la pensiuloj, estis ĵetitaj en profundan abismon de mizero. Kaj malgraŭ tio, ke ŝi preskaŭ 50 jarojn pagis en sian pensian kason, ŝi ricevis mizeran pension. Homoj diris, ke la pensioj de 50 milionoj da emeritoj estis forrabitaj de manpleno da malnovaj komunistoj, kiuj nomiĝas nun "novaj rusoj" kaj, akirinte la potencon, alproprigis al si la monon de la tuta

popolo. Tatjana ĝis nun ne komprenas tion: se antaŭe ĉio apartenis al la popolo, tiam post la disfalo de la lando oni estus devinta disdoni al la popolo ĝian proprajon, ĉiu civitano devintus ricevi sian parton de la nacia riĉaĵo. Tamen tio ne okazis. Oni-dire venis tempoj de sovaĝa kapitalismo, ĉe kiu ĉiu transvivis kiel li povas: fortuloj rabas, malfortuloj mortas, ŝtato kvazaŭ ne ekzistas.

Kaj kiam ŝia edzo, kun kiu ŝi bone-malbone travivis 40 jarojn, subite mortis de apopleksio, al ŝi restis nenio alia, ol denove serĉi laboron, ĉar sole ŝia pensio ne plu sufiĉis por pagi manĝon kaj loĝejon. Kaj ŝia medalo "Heroo de laboro" ludis neniun rolon plu.

Laboron laŭ sia profesio, kiel kuiristino, ŝi, pensiulino, ne plu akiris, do ŝi laboris ĉie, kie eblas: kiel pordisto, kiel helpanto en la kuirejoj de grandaj entreprenoj, kiel disdonanto de manĝaĵo en malsanulejo. Ĉe ĉiu oportuna okazo oni maldungis ŝin, ĉar pensiuloj ne havis multe da rajtoj, kaj ŝi denove devis serĉi laboron. Nun ŝi laboras – por kiom longe, ŝi ne scias – kiel vendistino de protektplastaĵoj por ŝuoj, sen kiuj ne estas permesate eniri poliklinikon. Kune, pensio plus salajro, sufiĉas por vivi. Por la vintro Tatjana aĉetas du sakegojn da terpomoj kaj preparas barelon da acida brasiko. Tio sufiĉas por transvivi la vintron. Nur panon kaj lakton, kaj malofte iom da kolbaso kaj fromaĝo ŝi aldone aĉetas.

Dum Tatjana pensis pri sia vivo, venis la mateno, malantaŭ la fenestroj heliĝis. Al ŝiaj gamboj venis ŝia kato Barsik kaj komencis frotiĝi kontraŭ ŝiaj tibikarnoj, petante manĝon. Tiun ĉi katon ŝi trovis en la korto, post kiam la aŭto de najbaro surveturis ĝin. Neniu kredis, ke eblas revivigi la beston, sed Tatjana portis la katon al veterinaro, poste kelkajn monatojn flegis ĝin, ĝis ĉiuj vundoj saniĝis kaj la rompitaĵoj de la piedoj kunkreskis. Kiam Barsik resaniĝis, ŝi lasis ĝin libera, sed ĝi ne volis forlasi ŝin kaj restis vivi en ŝia loĝejo. Nun Barsik estas granda, bone flegita kato kun pompa blankruĝa felo, kies

koloro kaj denseco similas al la haroj de Tatjana.

Ŝi manĝigis la katon, laŭ multjara kutimo ordigis la loĝejon, kaj decidis rigardi la novan vendejon, kiun oni antaŭ du tagoj, kiel rakontis najbarino, malfermis en la teretaĝo de ilia domo. Ankaŭ tio estas nova modo, ke "novaj rusoj" kripligas teretaĝojn de malnovaj, ofte eĉ historiaj domoj, por malfermi tie butikojn. Tatjana jam delonge bezonas novajn jupon, bluzon por laboro, kaj noktĉemizon kaj pantoflojn por la hejmo. Eble ŝi povus ion aĉeti en la nova butiko? Ŝi vestiĝis kaj forlasis la loĝejon.

Surstrate jam svarmis homoj, aĉetantaj por la malfrua sabata matenmanĝo panon, lakton kaj buteron. Tatjana ĉirkaŭiris la domon kaj de la stratflanko alproksimiĝis al la nova butiko. Super la pordo pendas grandega arĝenta ŝildo kun ruĝa subskribo "Ĉio por vi!", tiel nomiĝas la butiko. Ŝi eniras ĝin: la malgranda ejo, plenŝtopita de varoj, malgraŭ la frua horo estas plena de virinoj. La plej diversaj jupejoj, bluzoj, pantalonoj pendas vice ĉe la muroj ĝis la plafono. Tatjana rigardas vestaĵojn, kelkaj plaĉas al ŝi, sed ŝi ne povas trovi la prezojn. Por la bluzo ŝi povas elspezi ne pli ol 100 rublojn. Ŝi ankoraŭfoje rapide kalkulas: ŝia pensio estas 1500 rubloj, por la loĝejo ŝi pagas 1000 rublojn, por la telefono 200, 300 rublojn por gaso kaj elektro, restas ankoraŭ la salajro de 1000 rubloj, sed ĝi preskaŭ tute elspeziĝas por la manĝo, busbiletoj kaj aliaj nepre aĉetendaj aferoj. Ne, pli ol 100 rublojn ŝi ne povas elspezi!

Ŝi elektas du belaspektajn bluzojn kaj alproksimiĝas al la juna, forte ŝminkita vendistino, kiu ĝuste nun lakas siajn ungojn sangruĝaj.

"Junulino, bonvolu diri al mi, kiom kostas la bluzoj? Mi ne sukcesis malkovri la prezon," diras Tatjana.

"La bruna kun oraj strioj kvarcent, la nigra tricent kvindek," seke respondas la vendistino, ĵetinte rapidan rigardon al la bluzoj.

"Kio? Tiel multekoste?" ŝokite demandas Tatjana. "Ili ja ne estas silkaj, nek kotonaj, estas simple poliesteraj..."

"Tamen ili estas importitaj el Koreio, do konvena la prezo," respondas vendistino, daŭre okupiĝante pri siaj ungoj.

"Sed mi ne povas tiom pagi," preskaŭ flustras Tatjana.

"Se vi ne povas, ne aĉetu, ni havas sufiĉe da aĉetantoj," indiferente diras la vendistino, kontente rigardante al siaj ruĝe lakitaj ungoj.

Tatjana remetas la bluzojn kaj rigardas plu, ŝi devas aĉeti ion novan por dece aspekti ĉe la laboro, ŝin ja vidas ĉiuj vizitantoj de la poliklinikon. Ŝi elektas alian, nigran bluzon, kiu aspektas tre modeste, kaj grizan jupon, sed ankaŭ ili kostas po tricent rublojn.

"Mi estas pensiulino," diras ŝi al vendistino. "Ĉu vi havas ion, kio ne estas tiel multekosta?"

"Nenio kostas malpli ol tricent rublojn," estas la respondo.

Tatjana sentas, kiel ŝia vizaĝo ruĝiĝas kaj al la okuloj venas larmoj, sed retenante ilin per la lasta forto, ŝi laŭte diras, preskaŭ kriante:

"Kaj per kio ni, pensiuloj, vestu nin? Ĉu en la nunaj novaj tempoj ni devas surmeti ĉifonojn aŭ eble entute marŝi nudaj? Ĉu vi scias, ke mi 50 jarojn seninterrompe laboris, mian tutan vivon? Mi eĉ havas medalon pro tio! Kaj nun mi ne povas aĉeti al mi eĉ tiun ĉi simplan bluzon!..."

Ŝi sentas, kiel larmoj de humiliĝo ruliĝas laŭ ŝiaj vangoj. Ĉiuj virinoj en la butiko eksilentas kaj rigardas al ŝi, kelkaj kompate, aliaj pripenseme. La vendistino silentas. Tatjana turniĝas kaj per pezaj paŝoj iras al la pordo, sed antaŭ ol eliri ŝi returniĝas kaj krias tra la larmoj al la vendistino:

"Ĉu vi scias, kio estas via butiko? Via butiko estas – fekaĵo! Jes, jes, via butiko estas FE-KAĴO!..."

Ekstere neĝas, estas kutima marta vetero, malseka, malagrabla. Tatjana malrapide marŝas laŭ la strato, frosta vento kun neĝeroj blovas en ŝian ekscititan vizaĝon, laŭ kiu ankoraŭ ruliĝas la larmoj. Ŝi scias, ke en ĉi tiuj novaj sovaĝaj tempoj por ŝi kaj tiaj, kiel ŝi, ne plu estas loko.

Lena Karpunina

## Renkonto kun la Tempo Ezopa raporto Akuzo

Tute ne turiste sed en deva funkciado  
la Tempo vizitis Parizon.  
Ne urĝis tra la fama loko,  
nur paŝete plenumis sian okupon  
sed ne forgesis dume manifesti  
ieloke sian marŝon per rimarkinda signo.

En Montmartre  
la Sanktejo de la Giganta Meringelo  
flustre predikas la Pasinton  
kaj proponas sin pompa modelo  
por kiu ajn sentalenta pentristo  
el la tutgloba penikularo

Per sia fera montrofiguro  
la Mondocentra Turo de Marsa Kampo  
proklamas la Modernismon  
kaj provas toleri ĉirkaŭ si  
la centjaran svarmadon  
pripensante ĉion de supre

Sed izola kaj indiferente servizaĝa  
mutas en Montparnasse  
la Eŭklida Domkoloso  
paralizita pro la Spacepoko.  
Spegulas nur dormante  
la neimageblan sekreton  
kun svenigaj aspektoj  
de la Estonto.

Dum promeno Urbin Sako  
renkontiĝis kun limako:  
- Jen tiu riĉas pli ol homo  
kun surdorse propra domo!  
Urbinon kaptis nun envio,  
li ekparolis tuj al Dio:  
- Limakon vi per domo kronas,  
ja domon ankaŭ mi bezonas!  
Kaj fakte, preskaŭ sen atendo  
brile plenumiĝis lia mendo.  
Ekloĝis Urbin nun sendanke  
sed baldaŭ sentis ion manke:  
necesas vere pli da mono.  
Aktualas tial dua dono.  
Adresis Dion li denove:  
- Vi regas ĉion ja plenpove,  
nun helpu min per monrimedo,  
pli firmos poste mia kredo!

Sed Dio konis tiun specon,  
decidis puni l'avarecon,  
ruinigi lian monesperon  
kaj tial ŝanĝis la veteron.  
Per fulmo el kolera nubo  
la domo nun fariĝis rubo.  
Tutsenhava Urbin spertis  
ke nun mizero sin ofertis.  
Ekpensis li amare kaj enue  
ke bonstate vivis li pli frue.  
Nun restis lerni kun turmento  
la gravecon de kontento.

Aŭdiĝas serio  
de veokrio  
kaj plenda ploro  
de Kristoforo  
Kolombo  
en lia tombo.

En la memoro  
de l'Transveturo  
al Kristoforo  
briladas puro  
de vasta Maro,  
de l'Atmosfera,  
- nun al mizero  
damnita paro.

Aero venena  
pro flugogaso,  
Atlanto abomena  
pro malpuraĵo.

La Naturo,  
komuna domo  
de floro, mevo,  
nun dronas deve  
en la malpuro  
de la homo.

Akuze sonas  
eltomba ploro  
de Kristoforo.

## Trafikincidento

Amoro difektis flugilon merkrede  
kaj devis ĝis lunde marŝadi piede.  
Ripozon rifuzis agado programa:  
servadon plenumu ĉu laca, ĉu lama.  
Sed ekbrilis ideo, kun hela mieno  
li nun daŭrigis de Linz al Vieno.  
Lin frapis la penso ke am' kaj pasio  
sin distribui permesas per telepatio.  
En Wiena hotelo per eksperimento  
nun provis li tion kaj en Agrigento  
efiki ineton sen arko kaj sago.  
La provo sukcesis! En sama la tago  
diversloke pluen trafadis li bone:  
en Murmansk, Bruselo kaj Maskapalone.  
Trovinte la novan, genian rimedon  
uzadis ne plu nek flugilon, piedon.  
La arkon kun sagoj, unika trofeo,  
nun kovras la polvo en armila muzeo.

Nun floris dum tempo komforta praktiko  
ĝis foje li miksis sin kun la trafiko.  
Kaptis lin tie aplomba virino.  
Jen samomomente aperis la fino!  
Eksciis Amoro kun akra surprizo:  
la virino aktivas por savorganizo.  
Kaj nun ŝi lin trenis al institucio  
en kiu formortis de li la magio.  
De tiam ja mankas la ĉarma efiko  
sed ĉio pluiras per aŭtomatiko.

Stig Jacobson

## POEZIO

### Nokto de Umul

Frua ŝtonepoko.  
Nigras la luno.  
En angulo ardetas la fajro.  
Uunrrnŝngrrr... gruntemurmuras Umul,  
nevekas, nedormas,  
tordas sin, turnas sin, umas neŝate...  
Urrr... Jukas kelkloke en la hardensaĵo,  
ie sub la barbo. Gratas, gratas...  
Li volas trempi sian tufan kapon  
en la rivero, ĉe la falinta arbo,  
sed tro riskas la mallumo.  
En la mallumo ne helpas eĉ lia forta bastono,  
nun surtere ĉe lia flanko,  
atakilo, defendo, fidela akompano.  
Proksime Aluha, la virino.  
Momente li volas alrampi al ŝi,  
eniĝi...  
sed doloras genuo pro falo antaŭan tagon.  
Konfuzas interne...  
tridekok vortojn li konas,  
sed tridekok vortoj ne regas pensojn...  
Svarmas en li imagaĵojn nur,  
senkontura mikso de sonĝofantazio kaj emado,  
disŝirita realumeco, memorfragmentoj,  
aperaĵoj de vivesimila tromponebulo.  
ŝajnfigure ariĝas ombretoj  
de volo, bezono kaj neceso  
dum fantomas impresoj el subkonscia kaŝejo.  
Haltigi, fiksi, ordigi, vicigi, elekti,  
devi,, -ii senfine  
ĝis ie aranĝas sin vidbildesimila  
duonrealeca ĉeno de konceptoj  
de nova tago survoje post la nokto...  
sekurigi la fajron, ĉasi nutraĵon,  
trovi ankoraŭ farbon sufiĉe  
por la pentrado de bestoj sur la grotomuro  
- kaj mortbati la troaĝulon de ilia areto,  
sentaŭgulo, manĝanto nur...  
Ekskuas lin frostotremo.  
Bestokrio vekas la tagon.

### Inteco

ŝtono konforma.  
Artotalenta  
runfakulo.  
Longa laboro  
plena de peno.

Pezas la pago.  
Manplenoj pluraj,  
alkosta kvanto  
de mono arĝenta.

Surloke nun staras  
ŝtono bonfronta  
por ke atenton  
veku la runoj.

Falis la patro,  
viro sentima.  
En Oriento  
tombon li trovis.  
Gloras lin ŝtono.  
Filo ĝin metis  
patrino kun li.

Vivis momenton  
kvaro de homoj,  
flustris en vento,  
poste nur foris.

Eĉ ne la ŝtono  
plu ilin konas...

## ANEKDOTOJ

### Rusaj anekdotoj

Kuracista kabineto:

- Doktoro, kiam mi trinkas teon,  
mia dekstra okulo tre doloras.  
- Avino, ĉu vi eligas kuleron el la  
glaso?

Viro diferenciĝas de knabo nur  
per kosto de ludiloj.

- Mi bezonas laboron kaj urĝe!  
Mi havas edzinon kaj kvin  
infanoj!  
- Tre bone. Sed kion vi povas fari  
ankoraŭ?

- Doktoro, mia 17-jara filo havas  
troan pasion al komputilo. Li eĉ  
dormas apud ĝi. Kiel oni povas  
malkutimigi lin de tiu aĵo?  
- La solvo estas tre simpla!  
Brando, cigaredoj kaj virinoj.'

- Panjo, kiom da pasto enhavas  
unu tubeto?  
- Mi ne scias, fiĉjo.  
- Sed mi scias! De la fotelo ĝis la  
lavtablo.

Instruisto pri muziko diras al  
Vlaĉjo:

- Mi avertas, se vi kondutos  
malbone, mi informos vian  
patron, ke lia filo havas talenton.

Instruistino:

- Vlaĉjo, farbigu fenestrojn je tria  
etaĝo.  
Post unu horo. Vlaĉjo:  
- Mi farbigis la fenestrojn. Ĉu  
necesis farbigi lignon de la  
kadroj?

Vlaĉjo:

- Panjo, hodiaŭ direktoro de la  
lernejo demandis, ĉu mi havas  
gefratojn. Mi respondis, ke estas  
sola infano en la familio.  
- Kaj kion li diris?  
- Li diris: "Glor' al Dio!"

- Kio deziras esti via filo?  
- Rubisto.  
- Kial do?!  
- Al li ŝajnas, ke ili laboras nur  
marde.

Kvinjara knabo demandas antaŭ  
dormo:  
- Avino, kial aperas infanoj?

- Nu, tio-ĉi estas tre longa  
rakonto. Mi klarigos iam poste.  
- Avino, bonvolu rakonti  
almenaŭ pri la komenco.

Artifikisto elvokis la knabon al  
sceno kaj plenvoĉe demandas  
lin:

- Knabo, ĉu povas vi certigi, ke vi  
vidas min unuafoje?  
- Jes, paĉjo.

### Brazila anekdotoj

Granda kafkomercisto el Sao  
Palo esploras la kultiveblon de la  
interna lando. Unu tagon, en la  
ŝtato Mato Grosso, li ekvidas  
vastan kampon, kun nur kelkaj  
bananarboj, kaj, sub unu el ili,  
dormetantan kampulon. "Diru,  
amiko, demandas la komercisto  
montrante al la vasta senkultura  
tero, ĉu via grundo ne donas  
kafon? -- Ne, nenian kafon. -- Ĉu  
kotonon? -- Ne, nenian kotonon.  
-- Ĉu sukerkanon? -- Ankaŭ  
nenian. -- Tamen, se vi plantus  
kafarbojn, ĉu tio ne prosperus?  
-- Nu, kompreneble, se vi plantus  
ilin..."

### El la klasika revuo "Lingvo Internacia"

Patro: -Diru. Karlo, ĉu vi havas  
multajn amikojn en la lernejo?

Karlo: -Ne, neniun.

Patro: -Nu, kial?

Karlo: -Jen, vidas vi, la knabojn,  
kiuj min batas, mi ne povas  
toleri, kaj tiuj, kiujn mi batas,  
min ne povas toleri.

Juna virino ravanta: -Ah, sinjoro  
profesoro, kion diras tiu ĉi  
kverko, se ĝi povus paroli.

- Ĝi diras: "Pardonu, mia  
estimata sinjorino, mi estas tilio".

Konata verkisto ekkriis unutage  
"hm!" post amiko, kiun li vidis  
malproksime sur la strato.  
Dando, kiu tion ĉi aŭdis, ofendita  
sin turnis kaj ekvokis kun la  
manoj sur siaj flankoj: "Kiel vi  
povas riski krei 'hm!' kiam *mi* iras  
en la strato?" La verkisto,  
imitante la gestojn de l' dando  
kriis per tia sama malafabla  
tono: "Kaj kiel vi povas riski iri en  
la strato, kiam *mi* krias 'hm'?"



# En la kafejo

"Ĉu ankaŭ vi deziras iun el niaj bongustegaj tortetoj?"

"Ne dankon, por mi sufiĉas la tasego da kafo?"

Ni pagis kaj sidiĝis ĉe proksima tablo. Mi ekgustumis mian ĉerizan torteton dum mia amiko forblovis la vaporon de super sia tasego. Ni nur malofte povis renkontiĝi. Dum niaj studentaj jaroj ni amikiĝis pasigante multajn malfruajn vesperojn, diskutante pri la senco de la vivo. Nun ni ne plu loĝas en la sama urbo, sed tuj kiam eblas, ni klopodas renkontiĝi babilante dum unu aŭ du horoj en kafejo, kiam iu el ni ial vizitas la urbon, kie loĝas la alia. Tio estas pli bona ideo ol viziti unu la alian hejme, ĉar lia hejmo situas ekster la urbo, kaj en la mia svarmas infanoj, kiuj ne permesus al ni profunde diskuti.

"Ĉu vi vidis la mienon de la tortbakisto, kiam mi preferis nur trinki kafon?"

"Ne."

"Tio ne plaĉis al li, sed ne estas pro komercaj kialoj. La kafo kostas sufiĉe multe, por ke li gajnu siajn vivrivedojn."

"Kaj do..."

"Li tute certe estas narcisisto. Li malsanece admiras sin mem kaj siajn tortetojn. Tial li ne povas kompreni ke iu homo preferas ne manĝi ilin.

"Ĉu vi konas lin persone?"

"Tute ne. Multaj narcisistoj estas orfoj, sengefratuloj aŭ fraŭloj. Pro tio ili ne kutimiĝis ricevi ĉiutagan porcion da laŭdo kaj mallaŭdo. Por ili estas gravege ĉiam montri sian taŭgecon. Se iu ilin kritikis ili freneziĝas.

"Tamen la torteto estas bonega. Ĉu vi volas iom gustumi?"

"Ne dankon. Mi sekvas dieton. Mi jam sukcesis maldikiĝi, sed mi devas barakti kontraŭ mia tromanĝemo."

"Vi ne estas dika."

"Jes, tamen iom. Parte estas pro konsideroj al la sano, sed mi bone konscias ke ankaŭ estas pro la Dorian Gray-sindromo.

"Kio?"

"Nu, ĉu vi konas tiun romanon de Oscar Wilde?"

"Jes, pri la junulo, kiu deziras ke lia portreto maljuniĝu, sed ne li mem."

"Jes, mi fakte estas iom Grayeca. Tio tamen estas tute natura afero. Oni ĵus raportis ke viroj aĉetas pli da modaj vestaĵoj ol da elektraĵoj. Ankaŭ kosmetikaĵoj fariĝis tute ordinara afero ĉe viroj. Ĉu ne?"

"Jes, tion mi vidis."

"Do, kio pri vi mem. Ĉu ne ankaŭ vi komencos poluri vian eksteraĵon?"

"Mi fakte ne pensis..."

"Vi eĉ portas adoleskecajn vestaĵojn kvankam vi estas matura viro. Tio ne konvenas. Ŝajnas ke vi suferas pro la Peter Pan-sindromo."

"Kio?"

"Peter Pan estis heroo en libro de J.M. Barrie. Tiu knabo ne volis fariĝi plenkreska, fakte same kiel Oskaro en "La Lada Tambureto".

"Jes, tiujn librojn mi legis. La traduko de Chmielik estas bonega..."

"Sed la sindromo estas eĉ pli interesa. Vi ne volas porti respondecon. Tial vi preferas vesti vin en la vestaĵoj, kiuj nun estas tro malgrandaj por viaj filoj. Tre interese. Mi ne volas insulti vin; mi nur demandas. Ĉu vi iam sentis ke vi volas manipuli aliajn homojn? Aŭ ĉu vi opinias ke leĝoj kaj reguloj ne validas por vi. Vi ja manĝas tiun torteton kvankam vi estas... Ne, fakte vi aspektas same kiel antaŭe. Ĉu vi iam enamiĝis al maljunaj virinoj? Peter-Pan-uloj serĉas amatinon-panjon por ne devi esti plenkreska? Tio ĉi estas scienco. Do ne ofendiĝu."

"Mi tute ne ofendiĝas. Mi nur miras. De kie venas ĉiuj viaj ideoj?"

"Nun vi fakte ŝanĝas arenon. Ni parolas pri niaj mensaj malhelpoj, kaj vi komencas paroli pri de kie venas ideoj? Vi ne povas fuĝi for de via propra menso. Vi devas unue konscii pri viaj malhelpoj. Poste vi povos pli bone vivi kun ili."

"Jes, mi nur fidus al tio, kion mi vere komprenas.

"Ho ve, nun vi diskutas solipsisme. Vi opinias ke nur tio, pri kio vi konscias estas vera. Tio ne konvenas por intelektulo. Vi devas akcepti la atingojn de psihologio. Ja temas pri pruvitaj faktoj.

"Sed mi fakte estas tute feliĉa homo. Kiam la infanoj pligrandiĝis kaj mi ne plu devas vindadi, mia vivo estas bonega. Eĉ promeno en bona vetero kun mia edzino estas bonega. Birdokantado estas vere aŭskultinda. Ĉiu birdo kantas laŭ sia beko, kaj ekzistas tiom da malsamaj bekoj. Sed verdire la bekoj ne gravas, ŝajnas ke la birdoj estas malsamaj personecoj, kiuj kantas malsame. Ĉu ne?"

"Aĥ! Vi estas ĉiopsikisto! Ŝajnas al vi ke ĉiu estaĵo havas propran psikon. Ĉu vi pensas tiel ne nur pri bestoj, sed ankaŭ pri kreskaĵoj kaj ŝtonoj? Ĉu vi eĉ aparatenas al la Martinus-movado?"

"Tute ne. Mi tamen havas frotvundon sur mia dekstra kalkano kaj eksterordinare grandan nazon. Mi iros mendi alian torteton. Intertempe vi pripensu la ĝustajn terminojn por tio."

"?"

Leif Nordenstorm

# La alveno de la Centaŭranoj

Kiam alvenis la Centaŭranoj oni jam de jardekoj konstatis ke sur la kvara planedo apud la stelo vivas inteligenta specio. Ĝuste kiel fakuloj asertis, radio-komunikado estis multe pli promesanta kontaktomaniero kun eksterteranoj, ol sendado de gravuritaj mesaĝoj sur orumitaj plakoj en esploriloj. Je naŭ jaroj post la sendado de radia mesaĝo al alfa Centauri venis responda mesaĝo. Ĝi donis la samspecajn informojn, kiel la mesaĝo direktita al alfa Centauri 4, t.e. informoj pri la aspekto de la stel-sistemo ĉe Centauri kaj pri kelkaj molekuloj, troviĝantaj sur la kvara planeto. La responda mesaĝo kompreneble faris grandan sensacion. Dum pli ol monato la unuaj paĝoj de preska ĉiuj gazetoj en la mondo montris komence grandajn kaj fine malgrandajn artikolojn pri la novaĵo. Unue oni simple raportis pri la okazintaĵo. Poste sciencistoj diskutis ĉu la mesaĝo estas falsa aŭ ne. Pastroj, bonzoj, bramanoj, imamoj, kohenoj kaj aliaj teologoj kaj budhologoj komence skeptike kredis la opiniojn pri falsa mesaĝo, sed poste same fervore klopodis montri ke la propraj sanktaj skribaĵoj raportas pri antikvaj vizitoj de Centaŭranoj. Oni diskutis ankaŭ la probablecon de vojaĝoj inter Tero kaj Centauri 4, sed sciencistoj asertis ke oni bezonas vojaĝi dum pli ol 20 000 jaroj per la plej modernaj kosmoŝipoj por veturi al la menciita planedo. Ideojn pri tute nova maniero vojaĝi havis neniu. Tio ne malkuraĝigis al minimume okdek kvar vojaĝagentejoj komenci rezervadon da lokoj en la unuaj kosmoŝipoj veturontaj al Centauri 4.

Kiam alvenis la unuaj Centaŭranoj post nur tridek kvar jaroj, la Teranoj – male al la Centaŭranoj – ankoraŭ ne inventis novan manieron vojaĝi. Plej strange tamen estis ke neniu

rimarkis ke Centaŭra kosmoŝipo proksimiĝis al Tero ĝis kiam ĝi subite surteriĝis en Eŭropio. Sur la kosmoŝipo troviĝis naŭ Centaŭranoj, kies aspekto ne timigis la Teranojn, ĉar jam de tridek ok jaroj pli ol ĉiu dua japana bildstrio kaj pli ol sesdek procentoj de ĉiuj usonaj desegnitaj filmoj temas pri aventuroj de Centaŭranoj, desegnitaj la la bildoj sur la responda mesaĝo. Tial multaj infanoj kaj mezaĝuloj jam kutimiĝis al la aspekto de la alia specio. Montriĝis ke la Centaŭra socio dum la vojaĝo povis subaŭskulti kaj televidajn programojn kaj radian trafikon de la tero. Pro tio ili jam komprenis plurajn lingvojn. Ili tamen elektis kiel parolan lingvon Esperanton, pro ĝia logika gramatiko, sed ankaŭ pro ĝia interna ideo ke komuna lingvo pliprobabiligas pacon inter popoloj. Jam dekomence la alvenintoj asertis ke ili volas pacon sur Tero.

Reĝoj, prezidantoj kaj imperiestroj rapidis esti la unua, kiu invitis la Centaŭranojn al luksaj manĝoj. La invititoj povis informi la invitintojn ke baldaŭ alvenos aliaj kosmoŝipoj kun Centaŭranoj tiel ke la balda ĉiuj invitintoj povos havi Centaŭranajn gastojn. Pro tio ne nur grandaj landoj kiel Usono, Eŭropio kaj Ĉinio, sed ankaŭ malgrandaj kiel Ekvatora Gvineo kaj Palaŭo povis gastigi Centaŭranajn delegaciojn. La oficialaj manĝoj tute bone okazis. Oni ne povis tuj konkretigi planojn pri estonta kunlaboro, sed regis amikeca etoso inter Teranoj kaj Centaŭranoj en ĉiuj vizitataj landoj. Ĉie la kosmoŝipanoj povis rakonti pri siaj pacaj celoj de en la televidaj programoj.

Jam post kelkaj tagoj tamen la unuaj kritikaj artikoloj aperis en revuoj de Papuo-Nov-Gvineo kaj Rusio. La verkintoj demandis kial alvenis tia nombro da kosmoŝipoj. Ĉu ne sufiĉas unu aŭ du esploriloj por ke la Centaŭranoj kolektu informojn pri Tero kaj

revenu al Centauri 4? Alilandaj revuoj akre kritikis la kritikemajn voĉojn, kaj laŭdis la Centaŭranojn, kiuj volis inaŭguri la novan eraon da interplaneda kontakto kun larĝa delecacio. La pli ol ducent kosmoŝipoj montris ke la Centaŭranoj ne alvenas nur por scivolemo, sed vere por krei egalrajtajn kontaktojn. La samon montras ilia elekto de Esperanto kiel kontaktilon.

Tamen baldaŭ sveda dekstrisma partio postulis ke la Centaŭranoj ricevu nur trimonatan turisman vizon por Eŭropio. Kvankam la komune Eropia leĝaro ne antaŭsupozis alvenon de eksterteranoj oni klare povas konstati ke ĝi ankaŭ ne antaŭsupozis nekontrolitan alvenon de senvizaj neeŭropianoj.

Ĉiuj moderaj, liberalaj kaj maldekstraj partioj kompreneble forte protestis kontraŭ la neĝentila postulo de la sveda dekstrisma partio. Oni timis ke tio estas ne nur malĝentila, sed ke ĝi povus ankaŭ fortimigi aŭ eĉ malamikigi la transkosmulojn.

Pasis kvar semajnoj, kaj neniu el la ducent kosmoŝipoj montris ian ajn signon pri planoj forveturi. Nun ne nur svedaj dekstruloj, sed ankaŭ anoj de politike tute malsamaj movadoj montris signojn pri maltrankviliĝo. Multaj gazetoj jam komencis skribi pri la "Centaŭrana problemo". Oni iom ĝene komencis pridemandi la Centaŭranojn pri iliaj planoj pri la estonto. Ĉu ili planas longe resti sur la Tero? Kiajn informojn ili volas kolekti, antaŭ ol reiri per siaj esploriloj? Se ili volas kunporti aron da specimenoj el diversaj plantoj kaj bestoj diverslandaj universitatoj povos esti pretaj helpi pri la kolektado.

La Centaŭranoj tamen tute ne indigniĝis pri la demando. Ili klarigis ke ili volas resti iom pli, sed ke ili pretas labori por ne troprofiti el la tera gastameco. La reprezentantoj de la Teraj registaroj unue kredis ke la Centaŭ-

anoj volis labori je diversaj laboroj por konatiĝi kun malsamaj flankoj de la Teraj ekonomio kaj kulturo. La Centaŭranoj tamen asertis ke tio neniel estas postulo, ĉar la Terajn kulturojn oni jam delonge konas i.a. pro televidaj programoj videblaj sur la kosmoŝipo. Ili tute certe kontentiĝos se ili nur povos perlabori iom da mono por ke ili povu pagi por si mem, kaj por ne dependi de la bonvolo de Teranoj.

La gazetoj konstatis ke la Centaŭranoj ne havis planojn foriri de Tero. Baldaŭ oni komencis diskuti pri la kialoj. Kelkaj supozis la Centaŭranoj restis ĉar la vivnivelo sur Tero estas pli alta ol tiu sur Centauri4. Aliaj supozis ke la trankosmuloj restas sur Tero pro la samaj kialoj kiel dorsosakaj turistoj senlaboraj volonte restas en foraj landoj dum monatoj a eĉ jaroj. Triaĵ timis ke pli verŝajna estas la hipotezo ke la anoj de la alia specio restas ĉar ili esplorigardas por prepari okupadon fare de malamikaj trupoj.

La demandoj dum longa tempo staris sen respondo. La ekstremismaj malplimulto kiuj jam frue postulis limigon de la nombro de allaseblaj Centaŭranoj aŭ almena postulon pri vizo, nun ne estis same izolitaj kiel en la komenco. Oni ĉiam pli malkaŝeme diskutis la aferon. Nun anoj de ĉiuj politikaj partioj opiniis ke la alveno de Centaŭranoj kaj la risiko ke alvenos pluraj estas konsiderinda danĝero. Anarkiistoj plej longe unuanime restis pozitivaj al la alveno de fremda specio, sed eĉ inter ili komenciĝis dubo pri tio ĉu Centaŭranoj vere povas kalkuliĝi inter tiuj kiuj kontra as ŝtatan subpremon, ĉar oni ne povis rimarki ian ajn revolucieron inter ili. Dum la Rom-katolika eklezio apena komencis diskuti ĉu Centaŭranoj havas animon, usonaj protestantoj jam komencis traduki la Evangelion la Luko al la Centaŭrana, kaj nombris la Centaŭranajn savitojn je dek kvar.

La Esperanto-movado komence nur entuziasme bonvenigis la novajn esperantistojn al Tero. Dank' al ilia ekuzo de Esperanto la fina venko ŝajnis pli proksima ol iam ajn antaŭe. Post la

komenciĝo de ĉiulandaj diskutoj pri dezirindeco de estonta Centaŭrana minoritato sur Tero, la movado elektis neŭtralan sintenon pri la afero.

Nur je tri semajnoj post la alveno de la transkosmuloj komenciĝis onidiroj pri pasio inter Terano kaj Centaŭrano. Laŭ Germana klaĉgazeto ĝi komenciĝis tiel ke dekokjara junulino skribis amleteron al Centaŭrano loĝanta en hotelo en la sama urbo. La Centaŭrano telefonis al ŝi, ili renkontiĝis kaj komenciĝis amo. Post tio unua raporto komenciĝis svarmi raportoj pri amaferoj ĉie. Baldaŭ ekestis la demando ĉu Tercentaŭrana paro estas generpova aŭ ne. Certan respondon sciencistoj ne havis. Klaĉgazetistoj tamen post mallonga tempo prezentis la respondon: jes!

Jes! Ne! Tiuj du vortoj estis la plej oftaj vortoj sur la gazetafiŝoj la tagon poste. "Jes! Centaŭranoj estas homoj." "Ne! Ni ne povas riski tion." "Ni ne povos kontroli kion okazos, se naksiĝos mikscivilizaciuloj."

Baldaŭ en multaj landoj marŝis sur la stratoj manifestacioj: "Centaŭranoj for!" "Miksi rasojn jes. Miksi speciojn ne!" Episkopoj ĉiulandaj atentigis ke la manifestacioj memorigis pri okazaĵoj en totalismaj diktaturoj dum la dudeka jarcento, sed la voĉoj de la episkopoj dronis inter la voĉoj de iliaj diocezanoj.

Centaŭranoj for!

**CENTAŬRANOJ FOR!**

**CENTAŬRANOJ FOR!**

La Centaŭranoj tiam pakis siajn havaĵojn, iris al siaj kosmoŝipoj kaj vojaĝis for.

Leif Nordenstorm

## ANEKDOTOJ

### Famaj eldiroj

Post la elektoj en la jaro 1951 Charles de Gaulle diris: - Oni ne povas unuigi la popolon, kiu havas 365 specojn da fromaĝo.

La pentristo portretisto Stanislaw Witkiewicz (Stanislaw Witkiewicz) demandis klienton, ĉu plaĉas al li la pentraĵo. La pentristo respondis: "Sincere dirante, ĝi ne estas elstara verko". - "Vi ankaŭ ne estas elstaraĵo de naturo" - respondis la artisto.

Picasso vizitis ekspozicion de infanaj desegnaĵoj. Post la trarigardo de la bildoj la jam naŭdekjara artisto diris:

- En ilia aĝo mi pentris kiel Rafael. Mi bezonis multajn jarojn da laboro por ke mi povu komenci pentri kiel infanoj.

Hans Christian Andersen estis konata pro tio, ke li ne tro zorgis pri tio, kiel li estis vestita. Iam iu el liaj konatoj haltigis lin kaj diris al li:

- Ĉu tio, kion vi havas sur la kapo, estas ĉapelo?

Je tio Andersen kun bonkora rideto respondis:

- Kaj ĉu tio, kion vi havas sub la ĉapelo, estas kapo?

La tria kaj kvara citaĵoj venas el la libro Anekdotoj pri famaj homoj - kompilis kaj esperantigis E.V.Tvaroŝek. Libron oni povas aĉeti ĉe [www.espero.sk](http://www.espero.sk) Esperpres Bratislava, j. 1992)

## LITERATURO

### Legolisto

*Multaj literaturoj havas siajn legolistojn. Kiuj estas la 100 plej bonaj libroj de la X:a literaturo? Jen la baza legolisto de originala Esperanto-literaturo. Ĝi citas tiujn librojn, kiuj estis laŭ la opinio de William Auld legendaj aŭ almenaŭ legendaj. La liston William Auld kompilis en 1988 kaj ĝisdatigis en 1997.*

*Kiu volas kompletigi ĝin ĝis nia tempo?*

### Proza fikcio

Baghy, Julio: Sur sanga tero  
Baghy, Julio: Viktimoj  
Boulton, Marjorie: Okuloj  
Bulthuis, Hindrik Jan: Idoj de Orfeo  
Engholm, Stellan: Homoj sur la Tero  
Forge, Jean: Mr. Tot a etas mil okulojn  
Francis, John: La granda kaldrono  
Francis, John: Vitralo  
Lorjak: Regulus  
Luyken, Heinrich August: Pro Iŝtar  
Matthias, Ulrich: Fajron sentas mi interne  
Miyamoto Masao: Naskitaj sur la ruino  
Nemere István: Sur kampo granita  
Newell, Leonard Nowell: Bakŝis  
Oŝlak, Vinko: Jen la sablo el mia klepsidro  
Piĉ, Karolo: La litomiŝla tombejo  
Ribillard, Jean: Vivo kaj opinioj de majstro M' Saud  
Robinson, Kenelm: Se grenereto  
Cezaro Rossetti: Kredu min, sinjorino!  
Rossetti, Reto: El la maniko  
Rossetti, Reto kaj Szilágyi, Ferenc: 33 Rakontoj: la esperanta novelarto  
Schwartz, Raymond: Kiel akvo de l' rivero  
Schwartz, Raymond: Vole, novele  
Steele, Trevor: Sed nur fragmento  
Szathmari Sandor: Vojaĝo al Kazohinio  
Szilágyi, Ferenc: Koko krias jam  
Szilágyi, Ferenc: La granda aventuro  
Ŝirjaev, Ivan: Sen titolo  
Ŝtimec, Spomenka: Ombro sur interna pejzaĝo  
Tóth, Endre: Lappar, la Antikristo  
Urbanová, Eli: Hetajro dancas  
Varankin, Vladimir: Metropoliteno

## Poezio

Auld, William (red.): Esperanta antologio  
Auld, W., Dinwoodie, J.S., Francis, J., Rosetti, R.: Kvaropo  
Auld, William: La Infana Raso  
Baghy, Julio: Pilgrimo  
Baghy, Julio: Preter la Vivo  
Boulton, Marjorie: Eroj  
Giŝpling, Mikael: El sisma zono  
Goodheir, Albert: Merlo sur menhiro  
Hohlov, Nikolao: La tajdo  
Kalocsay Kalmán: Streĉita Kordo  
Kock, Edwin de: Fajro sur mia Lango  
Kurzens, Nikolai: Mia Spektro  
Maura, G.E.: Duonvoĉe  
Miĥalski, Eŭgeno: Plena poemaro  
Miyamoto Masao: Invit' al Japanesko  
Montagut, Abel: Poemo de Utnoa  
Neves, Kamaĉo, Dek, Fernández: Ibere Libere  
Peneter, Peter: Sekretaj Sonetoj (en Libro de Amo)  
Privat, Edmond: Tra l' silento  
Ragnarsson, Baldur: Ŝtupoj sen Nomo  
Rossetti, Reto: Pinta Kraĵono  
Sadler, Victor: Memkritiko  
Schwartz, Raymond: La Stranga Butiko  
Schwartz, Raymond: Verdkata Testamento  
Su, Armand: Poemoj de Armand Su  
Tarkony Lajos: Soifo  
Ungar, Krys: Meznokto metropola

### Serio Oriento-Okcidento

*Serio Oriento-Okcidento estas eldonserio kiu celas kontribui al la Programo de UNESKO por Reciproka Studo kaj Apezo de Kulturoj. En la serio aperas verkoj aparte gravaj kaj reprezentaj de la nacilingvaj literaturoj de diversaj landoj en la Okcidento kaj Oriento. Diversaj eldonejoj kontribuas iom post iom al la Serio. Ĝis nun aperis 49 titoloj. La kompletan liston vi trovos interrete ĉe [http://eo.wikipedia.org/wiki/Serio\\_Oriento-Okcidento](http://eo.wikipedia.org/wiki/Serio_Oriento-Okcidento) Ĉi-sube vi trovos kelkajn ekzemplojn*

1. Malsata ŝtono de Rabindranath Tagore.
2. Rakontoj de Oogai de Oogai Mori.
3. La naŭzo de Jean-Paul Sartre.
4. Kalevala.

35. Ĉe akvorando
- \*36. La Dharmo-pado.
37. Sensorteco de Imre Kertész.
38. Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito de Jaroslav Hašek.

43. Fraŭlino Maitreyi de Mircea Eliade.
  44. Romano pri la Tri Regnoj de Luo Guanzhong.
  45. La edzino de kuracisto Hanaoka Seisyū de Ariyosi Sawako.
  46. Pilgrimo al la Okcidento de Wu Cheng'en.
- \*Sen numero: Aniaro de Harry Martinsson.

\*La Dharmo-pado kaj Aniaro nun estas rabate aĉeteblaj. Vidu la anoncon sur paĝo 6.

# Origino de Esperantaj vortoj

*Kie oni povas paroli Esperanton regule? Eble je la renkontoj de la kluboj, sed ofte oni elektas la svedan por ke ĉiu komprenu. En la studejo de Vuxenskolan, Karl-Gustavsgatan 15, en la centro de Gotenburgo, ni komencis konversacian studrondon en januaro 2007. Kaj preskaŭ ĉiuj daŭrigis la renkontojn sep aŭ ok vendredojn po studsezono.*

*Ĉiu kontribuas al la programo per prelegetoj, skribaĵoj aŭ lingvo-ludoj. La 2an de oktobro ni havis invititan gaston - Ebbe Vilborg. 12 aŭskultantoj ĝuis la prelegon pri la originoj de kelkaj E-vortoj. Mi petis la tekston, kaj nun ankaŭ vi povas ĝui ĝin.. En la fino estas demando, al kiu vi povas doni komenton.*

*Bonan legadon!*

*Siv Burell*

Estas agrable viziti tiun ĉi rondon, ĉar mi ŝatas ĝian labormetodon: aŭskulti esperantan tekston kaj poste diskuti ĝian enhavon.

Siv donis al mi liberan elekton de temo hodiaŭ. Mi elektis paroli iom pri mia laboro rilate la originon de esperantaj vortoj.

Mi havis kontakton kun Esperanto relative frue en mia vivo, ĉar mia patro aĉetis lernolibron pri Esperanto. Li neniam legis ĝin, sed mi sciis, ke ĝi ekzistas en la libroŝranko.



*Ebbe Vilborg*

Kiam mi unuafoje komencis lerni eksterlandan lingvon en la lernejo (temis pri la germana,

ĉar ĝi estis tiutempe la unua lingvo en la svedaj lernejoj), mi komencis foliumi en la Esperanta lernolibro kaj sur la unuaj paĝoj konstatis, ke multaj vortoj estis samaj kiel la svedaj plus -o: piano estas instrumento, tigro estas besto, motoro estas maŝino ktp.

Tio vekis en mi simpatian por Esperanto. Mi ankaŭ konstatis, ke la libro helpis min gramatike: kiam mi devis lerni la akuzativon en la germana lingvo, mi samtempe komprenis la rolon de la akuzativo en Esperanto.


Mi fakte lernis Esperanton dum la jaroj de la milito – tre maloportune, ĉar tiam la internacia komunikado estis tre malgranda kaj ne multaj Esperantaj societoj funkciis.

Tamen en Gotenburgo vivis pioniro Oskar Svantesson, kiu malgraŭ ĉio aranĝis malgrandajn kursojn, kaj kiam finiĝis la milito mi iom bone sciis eon.

Mi partoprenis la kongreson de Malmö 1948, kaj tio estis mia eniro en la Esperantan mondon. Mi ankaŭ diru ke mi persvadis mian patron malfermi sian lernolibron; li estis kun mi en Malmö. Iom strange, ankaŭ mia avo komencis studi Esperanton. Do en mia familio la esperantaj studoj funkciis nenature: de filo per patro ĝis avo.

Nu, kelkaj Esperantaj vortoj havas germanan originon, ofte gravaj kaj ĉiutagaj: lerni, vorto, danki, bildo, fali, jaro, knabo, varma. Ni svedoj kompreneble dankas pro tio; ni ja rekonas la plej multajn el tiuj vortoj en nia propra lingvo.

Sed por konstati la originon de aliaj vortoj necesas informiĝi pri tio, kiujn lingvojn Zamenhof sciis, ĉar eo ja estas unuvira lingvo. Certe estas ke unu el la grandaj eŭropaj lingvoj Zamenhof ne sciis, nome la hispana. Li neniam kaj nenie menciis la hispanan kiel unu el liaj lingvoj.



*Lazaro Ludoviko Zamenhof*

Sed kompreneble li sciis ne nur la germanan sed ankaŭ la francan kaj la anglan. Plue, la pola kaj la rusa estis lingvoj de lia ĉirkaŭaĵo. En la lernejo li poste studis la latinan kaj la grekan. Kiel judo li ankaŭ lernis la hebrean kaj la jidan (*jiddish*), lingvo parolata de la polaj judoj. Ĝi cetere hodiaŭ havas la rangon de oficiala lingvo ankaŭ en nia lando. Tiuj naŭ lingvoj certe estis sufiĉaj por trovi vortojn por internacia lingvo, ĉu ne?

Tre saĝe Zamenhof volis antaŭ ĉio preni vortojn internaciajn, konatajn en multaj landoj. Tamen, bedaŭrinde, la ĉiutagaj vortoj ja ne estas tiaj.

Sed – ĉu oni ne povas krei vortojn kaj ignori ekzistantajn lingvojn? Certe. Ĉiuj scias ke la fama tabelo en esperanto – kiu, kie, kiam ktp – estas artefarita, sed praktika. Cetere, ankaŭ se oni fabrikas vortojn, ili devas esti inspiritaj de io. La Kiu-serio estas certe influita de francaj vortoj; kiu estas qui en la franca, kiam estas quand ktp.

Iom facilmaniere oni ofte diras ke esperanto konsistas je okdek procentoj de romanaj vortoj, inkluzive la latinan, kaj dudek procentoj de ĝermanaj; slavaj vortoj apenaŭ estas troveblaj. Do nia internacia lingvo havas okcidenteŭropan karakteron.

## Etimologio

Mia intereso pri origino de vortoj kreskis daŭre, kaj mi konstatis ke tiu branĉo fakte estas speciala scienco en la lingvoscienco, kun la nomo etimologio. Etimologio estas greka vorto, kiu signifas "la studo de la vero", ĉar la antikvaj grekoj iom naive kredis ke: se oni scias la originon de vorto, oni scias ĝian veran signifon. Tio tute certe ne estas vera!

Nu, ĉiu grava lingvo havas sian etimologian vortaron – krom Esperanto, mi konstatis kun bedaŭro. Kaj mi decidis ŝtopi tiun breĉon.

Tio estis fatala decido, kiu kaŭzis dekjaran laboron.

Nuntempe mi ne komprenas, ke mi aŭdacis komenci tiun taskon ekstreme temporaban. Ĝi postulis serĉadon en multaj libroj kaj kolosan korespondadon. Plej malfacile estis serĉi kaj trovi artikolojn en diversaj revuoj; estis neeble aboni revuojn de la tuta tero. Golden, unu el la plej aktivaj etimologoj en Esperantujo, havis la principon neniam verki artikolojn dufoje en la sama revuo.

Sed Esperanto havas unu specialan avantaĝon antaŭ aliaj lingvoj: ĝi havas t.n. oficialajn vortojn, tiujn kiuj troviĝas en la fundamento kaj ties aldonoj. Do mi certe sciis kiujn vortojn mi pritraktu. Je mia ĝojo nia sveda Esperanto-eldonejo akceptis la ideon kaj poste eldonis la verkon en kvin kajeroj. La unua publikigis en 1991, la lasta en du mil unu. La eldono preskaŭ ĉesis post la kvara volumo; io okazis en la eldonejo kio kaŭzis atendadon de la lasta kajero dum kvin jaroj.



*Etimologia Vortaro de Esperanto - kvinvoluma verko*

La apero de mia etimologio havis tute neatenditan rezulton: ĝi inspiris aliajn fari la samon, kaj nun Esperanto posedas tri kvar eti-mologiajn leksikojn. Jen la verko de Cherpillot el Francio kaj la verko de Yamasaki el Japanio. Unu estas "konciza", la alia estas "pragmata"; kio tion ekzakte signifas, mi fakte ne scias. Sed en ambaŭ enestas multe pli da esp-aj vortoj ol en mia, ĉar la verk-intoj ne haltis ĉe la oficialaj vortoj; ili enmetis ankaŭ aliajn. Kio tamen mankas en tiuj du libroj estas la diskuto, kiu ĉeestas en la mia preskaŭ ĉe ĉiu vorto.

Ĉu tiuj verkoj do klarigas la originon de ĉiuj Esperanto-vortoj? Nu, ne ĉiuj. Restas eta grupo, kiu ŝajnas nesolvebla. Kaj ĉi tie oni devas demandi: kial la esperantistoj ne intervjuis Zamenhof kiam li ankoraŭ estis en la vivo? Mi absolute ne komprenas tion.

Zamenhof volonte parolis pri sia lingvo kaj certe respondus. Ne demandi lin estas grava neglekto, miso kiu lasis enigmojn al venontaj generacioj.

## Du enigmoj

Fine mi volas paroli pri du el tiuj enigmoj. Temas pri vortoj, kiuj ĉiuj el ni uzas de tempo al tempo: *edzo (make)* kaj tuj (*med detsamma, genast, omedelbart*).

Pri la unua Zamenhof fakte donis klarigon; la problemo estas ke ni ne kredas lin. Li diris, ke komence ne temis pri viro – edzo – sed pri la virino – edzino. Tiun vorton li prenis el la germana Kronprinzessin, facila por ni svedoj kiuj ja diras kronprinsessa. Ĉar ŝi estas ligita al la kronprinco, ŝia titolo povis signifi "*hustru*". Poste el la vorto edzino li tute logike faris la vorton edzo "make".

Kial ni do ne kredas al Zamenhof? Nu, ĉar ne ĉiu princino estas edzino kaj eĉ malpli ofte edzino estas princino! Kaj krome: de kie venas do: edzino?

Kelkaj trovis en la jida vorton, kiu signifas "edzino de rabeno"; ĝi havas plurajn formojn: rebedzin, rabbedse ktp. Zamenhof ja ne volis rekoni, ke li iam pruntis vortojn de la jida. Ni ne scias.

Al la alia: tuj ekzistas en neniu lingvo. La francoj diras tout de suite, sed tio ŝajnas tro brutala deformo kaj ne klarigas la jo-n. - En la litova lingvo troviĝas vorto tuoj kun la sama signifo (mi ne ekzakte scias la prononcon), kaj iu trovis dialekton litovan, kiu havas la prononcon tuj. La problemo estas ke Zamenhof ne sciis la litovan. Sed, diras iu, Zamenhof laboris certan tempon kiel kuracisto en urbo de Litovio: eble li lernis kelkajn frazojn; ekzemple la frazo "Venu tuj" povis esti dirata ofte al kuracisto. Tiel oni povas diskuti tien kaj reen sen atingi certan rezulton.

Sed ĉiuj konstataj ke TUJ estas tre efika vorto, multe pli ol la franca tout de suite aŭ la angla immediately.

Kaj tio, ĉu ne, estas kion ni deziras: Esperantoo kiel efika lingvo!

Parolinte pri la etimologiaj verkoj oni certe povas diskuti ĉu ili estas necesaj por Esperanto aŭ nur estas speco de amuzo por lingvoamantoj. Kaj tiun demandon mi volas direkti al vi: necesa aŭ nur amuza?

Ebbe Vilborg

## X

### Vad betyder ett X på adressetiketten?

Om det är ett X på din adressetikett betyder det att du inte har betalat din medlemsavgift i Svenska Esperantoförbundet för 2009. Om du är direktmedlem skall du betala enligt anvisningarna på sidan 2.

Om du är medlem i en lokal esperantoklubb skall du betala avgiften till din klubb.

Du behövs som medlem i Esperantoförbundet.

Se estas ikso sur via adresetikedo, tio signifas ke vi ne pagis vian membrotazon por Sveda Esperanto-Federacio por 2009. Se vi estas rekta membro, pagu laŭ la priskribo sur paĝo 2.

Se vi estas membro de loka esperantoklubo, pagu la kotizon al via klubo. Sveda Esperanto-Federacio bezonas vin kiel membron.

## RECENZOJ

# Pri Universala Esperanto-Asocio

*Utila Estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA. Ulrich Lins. Movado. UEA. Rotterdam. 2008. 126 paĝoj. Prezo: 15.00*



Ĉiu esperantisto kiu iom regule sekvas la gazetaron nian ne povis ne rimarki ke Universala Esperanto-Asocio festis sian 100-jaran jubileon dum 2008.

D-ro Ulrich Lins, jam fama pro sia grava historia verko "La danĝera lingvo" pri la persekutoj de esperanto kaj ĝiaj uzantoj, verkis, komisie de UEA, libreton pri ĝia historio, "Utila Estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA." La libro konsistas el tri kelkdekpaĝaj eseoj; la plej longa (44 paĝoj) estas ĝenerala super-rigardo pri la unua jarcento de UEA, la dua (22 paĝoj) temas pri la kreinto de UEA Hector Hodler kaj la tria (39 paĝoj) havas la ekscitan titolon "Ivo Lapenna kaj la komunistoj". Je la fino troviĝas listo pri prezidantoj, direktoroj kaj redaktoroj, krome "Kroniko de la esperanto-movado" kaj ankaŭ mallonga bibliografio. Abundas interesaj fotoilustraĵoj.

La stilo estas same sobra kiel la lerta navigado tra la historio de la asocio. La aŭtoro sukcesas eskapi surgrundiĝon sur la multaj subakvaj ŝtonoj, kiuj ja ekzistas en multfaceta organizo kiel la nia.

Mian personan intereson pleje kaptis la ĉapitro pri Lapenna. Neniu el la gvidantoj de UEA, ja el la tuta esperantomovado, vekis ĉu adoran entuziasmon, ĉu ardan antipation kiel Ivo

Lapenna, kompreneble tio baziĝis je lia karisma personeco. Neniu je tioma grado investis siajn tempon, laborforton kaj prestiĝon, neniu tiel senkompromise, plej ofte kun sukceso, venkigis siajn proprajn opiniojn ene de la movado. Estas nefutebla fakto ke Lapenna estis la arkitekto de la moderna UEA.

Tial mi kun scivolemo eklegis pri "Ivo Lapenna kaj la komunistoj". Tiu eseo estas sendube la plej interesa enhavanta por la ĝenerala publiko antaŭe neknotatajn faktojn pri kaj la vivo, agado kaj la ideologia fono de Lapenna.

Jam kiel unuajara studento pri juro Ivo Lapenna ekstudis esperanton en 1928 kaj en la posta jaro kunfondis la Akademian Esperantistan Klubon (AEK) de Zagreb. Multaj studentoj tiutempe estis maldekstremaj, jes marksismaj, kiel ideologia bazo de la kontraŭstaro al la tiama burĝa diktatoereca reĝimo en Jugoslavio. La studentaro estis kontraŭ faŝismo kaj neegaleco inter la popoloj de Jugoslavio. En Septembro 1937 Lapenna elektitiĝis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj kuplis la agadon por esperanto kun rezisto kontraŭ la naziismo en Germanio kaj la faŝismo en Italio kaj iomgrade kontraŭ la enlanda reĝimo. Kiel "la kancera vundo de la esperantista movado" li karakterizis la falsan komprenon de neutraleco politika. Dum la Universala Kongreso en Londono (1938) li, kiel iu memoras, "kvazau elektrikŝokis la kongreson per maŝinpafilo flujaj paroladoj ĝuste pri la temo ke interna ideo estas bastiono kontraŭ faŝismo". Dum la milito li laboris en redakcioj de subgrundaj gazetoj eldonataj i.a. de Komunista Partio de Kroatio. Post la venko de la trupoj de Tito Lapenna revenis al Zagreb kiel estro de la informa fakto de la kroata registaro kaj ĉefredaktoro de la oficiala gazeto Narodne novine (Popola Gazeto). Tiom gravaj postenoj verŝajne ne estus donintaj al nepartiano, kvankam Lapenna mem ne klare esprimis sin pri la temo. Aliaj

tamen atestas ke li tuj post la milito fariĝis membro de la Komunista Partio. En la universitata medio li karieris rapide.

Dum la UK en Bern (1947) prezentiĝis rezolucipropono far' de ok landaj asocioj, ĉefe orienteuropeaj, kiun verkis Lapenna. Ĝi tekstas i.a. jene: "Konsciante pri la fakto ke diversaj profitavidaj grupoj deziras provoki novan, ankoraŭ pli teruran mondmiliton, preparante ĝin grandskale kaj finance kaj teknike kaj spirite;...

(La Kongreso): Alvokas ĉiujn esperantistojn, La Esperanto-organizaĵojn kaj la Esperantogazetaron senĉese kaj energie kontraŭbatali la restaĵojn kaj novajn fajrujojn de faŝismo, senkonsidere al formo kaj aspekto sub kiuj ĝi agas, senmaskigadi la preparantojn kaj provokantojn de nova milito; aktive subteni ĉiujn demokratiajn pacajn tendencojn..." Sendube eĥas la oficialaj starpunktoj de la tiamaĵ Orienteuropeaj landoj. La propono malvenkis en la voĉdonado.

En 1949 Lapenna ekloĝis en Parizo, li seniluziigis pri la politika stato en Jugoslavio, en 1950 li ricevis politikan azilon en Francio, en 1951 li transloĝiĝis al Brito, kie li poste fariĝis profesoro ĉe la prestiĝa London School of Economics.

Dum la kvindekaj jaroj plenaj je kontraŭkomunistoj tendencoj, "la epoko de la malvarma milito", Lapenna iĝis celo de kalumnioj kaj atakoj de la plej ekstremaj rondoj ene de la esperantomovado en Usono.

Lapenna senĉese laboregis en UEA kaj por esperanto, li akiris fortegan pozicion en la movado kaj ĝuis aprezon kaj en la t.n. Okcidentaj kaj en la Orientaj ŝtatoj, ĝis la tragikaj miskomprenoj plurflankaj ĉirkaŭantaj lian ekziĝon kiel prezidanto de UEA dum la kongreso en Hamburgo (1974). Sed multe pri pli tio en la informriĉa eseo de Ulrich Lins!

Ankaŭ la du enkondukaj eseoj en la libreto estas interesegaj kaj plenaj je faktoj. Mi ŝatus fini per: "Utila Estas Aĉeto"!

**Tomas Jansson**

## Saĝe pri lingvoj Falska vänner och andra

Lagom finns bara i Sverige, och andra myter om språk. Mikael Parkvall. Telegram bokförlag. 2009. 171 sidor/paĝoj.



Ofte okazas ke lingvistoj esprimas sin malfavore pri Esperanto - sed hodiaŭ mi ĝoje konstatas ke sveda rekonita lingvisto tre boninformite taksas la internacian lingvon de Zamenhof. Tio klariĝas en ĵus aperinta libro de Mikael Parkvall ĉe la universitato de Stockholm. Lia libro "Lagom finns bara i Sverige" enhavas dudek kvin mallongajn ĉapitrojn kaj la dudekduam koncernas tute Esperanton kun profesia ekzamenado kaj referaĵoj de pli-malpli negativaj kritikantoj (kiuj plejparte preskaŭ neniam scias pri la koncernita lingvo, kiel ekzemple Peter Gärdenfors!)

La libro de Parkvall estas certe funde fidinta el sciencfaka vidpunkto kaj krom tio verkita de aŭtoro kun evidenta talento popularigi sian larĝan prezentadon de sciindaj lingvaĵoj. Kaj seriozecon la aŭtoro kapablas kombini kun efika ŝercemeco, kio foje-foje gajigas la leganton.

En la priesperanto ĉapitro Parkvall parenteze rakontas ke lia avo en Åsele siatempe interesiĝis pri Esperanto samkiel multaj aliaj provincoj.

Mi rekomendas: Demandu ĉe via komunuma biblioteko pri la tutfreŝa libro de Mikael Parkvall (presjaro 2009).

Pruntu gin kaj legu ĝin de la komenco ĝis la fino, kaj legu ĉapitron 22 almenaŭ du fojojn.

Martin Persson

Falska vänner i språk kan vara nog så besvärliga, men att förväxla ytligt bekanta med mer omtyckta kan också leda till pinsamheter: Denna gång handlar språkspalten om betydelsenyanser av ordet 'vän'.

Att *amiko* betyder 'vän' på esperanto och femininformen *amikino* 'väninna' kan tyckas ganska okomplicerat, men beroende på sammanhanget - kanske rentav bara för att man pratar om relationen mellan personer av olika kön - kan det såväl på esperanto som flera andra språk tolkas som någon som är lite mer än en vän, en pojk- eller flickvän. I tvåspråkiga ordböcker framgår det dock inte alltid så tydligt att sådana betydelsenyanser kan finnas, särskilt inte i fickordböcker som av utrymmesskal ofta är mindre omfattande.

I Bensons *Comprehensive English-Esperanto Dictionary*, som förvisso bara går från engelska till esperanto, finns *boyfriend* (*girlfriend*) översatt med *karul(in)o* under uppslagsordet *friend*. Ofta finns ju mer specifika ord man kan använda - och kanske bör använda för att undvika pinsamma missförstånd, till exempel nyss nämnda *karul(in)o* 'käreasta' eller *koramik(in)o* 'hjärtevän', om det är den betydelsen man menar.

Men även med en mindre omfattande ordbok är det möjligt att hitta sådana betydelsenyanser själv genom att jämföra vad - till exempel - *vän* och *väninna* respektive *flickvän* och *pojkvän* översätts till, om de översätts till samma ord. Ett annat sätt är att slå upp det översatta ordet åt andra hållet och se vilka betydelser som föreslås. Och om inte annat är att bläddra i ordböcker för nöjes skull ett utmärkt sätt att utöka sitt ordförråd.

Olof Pettersson

### Bliv medlem i UEA 2010

Universala Esperanto-Asocio är den största organisationen i världen för esperantister. Den behöver ditt stöd för att allt bättre uppfylla sina viktiga uppgifter att

- sprida esperanto
- verka för en lösning på språkproblemet i internationella sammanhang
- underlätta all sorts kommunikation mellan människor oavsett ras, religion eller politisk åsikt
- därmed öka förståelsen mellan folk och länder.

UEA ger ut flera esperantotidningar bl.a. Revuo Esperanto och har en omfattande bokförsäljning. Som direktmedlem får du köpa böcker från UEA:s bokservice med 10 % rabatt 2 gånger om året, och ifall du är MA-medlem får du rabatten vid obegränsat antal köp. UEA anordnar även varje år en stor internationell världskongress.

För din egen del betyder det, att du får UEA:s årsbok med namn och adresser på delegater i hundratalet länder, och, om du är MA-medlem, får du tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad, som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser.

Information: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, 242 35 Hörby, tel. 0415-50152

Avgifterna för år 2010 är följande:  
**MA Direktmedlem med årsbok** och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får tidningen Kontakto. 600 kr  
**MJ Direktmedlem med årsbok.** I övrigt se ovan! 240kr

**MG Direktmedlem med "Gvidlibro".** Ger inte nersatt kongressavgift. 95 kr  
**SZ Avgift för Societo Zamenhof** särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA. 1 200 kr

**PT Patrono de TEJO,** får tidningen Kontakto 720 kr  
**DM Dumviva membro** betalar för hela livet. Får årsboken och tidningen Esperanto 15000 kr  
**DMJ Dumviva membro kun jarlibro** betalar för hela livet. Får årsboken 6 000 kr

**Dpat Dumviva Patrono,** betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och Blir därtill ständig medlem i "Societo Zamenhof". 150 000 kr

**DPT Dumviva Patrono de TEJO** betalar för hela livet och får tidningen Kontakto. 18 000 kr